

Bô Yin Râ

RELEVIÔ

KOBERSCHE VERLAGSBUCHHANDLUNG AG
BERN

La civitana nomo de Bô Yin Râ estis
Joseph Anton Schneiderfranken

Dua eldono
La unua eldono aperis en 1926

El la Germana originalo
(„Auferstehung“, eldono de 1959)
tradukis A. Rehfeldt (<http://boyin-ra.org/esperanto/>)

Antaŭparolo

Estos apenaŭ bezonata aparta pravigo por tio, ke mi uzas la titolan vorton de la unua el la sekvantaj dekdu ĉapitroj kiel la kvazaŭ simbolan titolon de la tuta libro.

Kio estas donata ĉi tie, tio celas gvidi la animon el tomba mallumo kaj mucida aero al vera *releviĝo*.

Sed multaj estas anime entombigitaj, kiuj eĉ ne *suspektas*, ke ilin ĉirkaŭas putrado kaj enfermas kriptomuroj. –

Aliaj nesupozite falas pli kaj pli profunden en la nokton de morto, ĉar en malsaĝa avideco ili lasas sin forlogi per la deziro rigardi la fosforeskon de putrado kaj malkomponado el plej proksima distanco, ĝis plu neniu elirejo estas trovebla, kiu povus rekonduki ilin en la helecon de l' tago.

Tial necesiĝas, ke hela torĉolumo konsciigu al la endanĝeritoj, kie ili estas.

Estas ne malpli necese montri al naivuloj, ke ili estas enirontaj en *tombokriptojn*, opiniante, ke ili malkovris sekretajn *templojn*.

Sed sufiĉu tiuj bildaj paroloj!

Mi kredas, ke eĉ sen tiaj bildoj la celo de tiu ĉi libro evidentiĝos al ĉiu senantaŭjuĝa leganto, kaj oni

certe komprenos, kial la diversaj partoj, ĉiu el kiuj estas kompleta, estis aranĝataj en la vico elektita.

Kiu enprenas en sin la libron tiel, kiel ĝi estu enprenata, tiu certe ne bedaŭros, ke li legis ĝin, – mi eĉ kredas, ke li tiam *ofte* ĝin relegos, ĝis li vekigos al tiu „*releviĝo*“, kiu estas nek nekomprenbla miraklo nek ago de arbitra graco, sed *la spirita destino de ĉiu tera homo*.

Bô Yin Râ

Releviĝo

Vere ekzistas veroj, kiuj – nedepende de la tempo – radias kvazaŭ eternaj steloj en la malluman ekziston de l' homo de la tero, por sciigi lin, foriĝintan de Dio, pri la lumo, el kiu li mem originas laŭ sia spiriteco.

Bone estas al tiuj, kiuj, ligitaj al peno kaj tera servuto, ankoraŭ povas levi sian rigardon al la supermondaj altoj, de kie tiu mistera lumo povas atingi ilin por plenigi ilian koron per sia eterna brilo.

Ĉiu tenebro de la tero cedos al la homo, kiu plenigite de tiu lumo tramigras ĝin, kaj kie antaŭe timigis lin grizaj fantomoj, tie anĝeloj de la ĉielo preparos al li helan vojon. –

Sed la malmola mizero rabis al multaj la kuraĝon *levi* la okulojn de sur la tero, kaj ili troe timas perdi la *firman grundon* de sub siaj piedoj, se iam estiĝas en ili la sopiro levi la kapon.

Al iliaj oreloj sonas voĉoj, kiuj vokas:

„Vi estas *katenitaj* de la tero, estante ĝiaj servutuloj!

Rezignu la iluzion, ke vi povas ricevi helpon el iu luma alto!

Ne kredu al vantaj legendoj, kiuj volas sciigi vin pri iu regno de la spirito, kiu estas nur elpensajo de malsagaj malfortuloj, kiuj same kiel vi devis pasadi tra dornoplena dezertejo kaj provis forgesi la pusajn vundojn de siaj sangantaj piedoj per tio, ke ili elpensis al si tiun fabelon!“

Multaj lasis sin konfuzi de la superlaŭta grakado de tiuj voĉoj kaj ekde tiam ne plu kuraĝis meti sian esperon sur alta helpo, tiel ke la tagoj de ilia tera vivo fariĝis al ili nur senluma turmentado kaj sensenca ofero ...

Kaj tamen la lumo de l' spirito estus povinta alporti ankaŭ al ili *liberigon*, tamen ankaŭ por ili la tenebro ĉirkaŭanta ilin estus tuj *heligita*, se ili mem estus *malfermintaj sin* al la radioj, kiuj celis atingi ilin el la regno de la *spirito*. — —

Iam homo estis ricevinta „komision“ de sia „patro“, kiu laŭ lia diro estis „*pli granda*“ ol li, kaj tiu homo parolis:

„Mi estas la releviĝo kaj la vivo: kiu kredas al mi, eĉ se li estos mortinta, tiu vivos, kaj ĉiu, kiu kredas al mi, por ĉiam ne mortos.“

Li vere ne parolis pri rigida *konfeso*, sed pri *si mem* kaj pri tio, kio *li mem* estis, kaj sufiĉe klara estis lia vorto: ke li konas „la siajn“, kaj la liaj konas lin.

Sed la plej multaj homoj ankoraŭ ne scias, *kiu estis* tiu, kiu povis diri tion, – kiuj estas la „*liaj*“, al kiuj li apartenis, – kaj kiu estas la „*Patro*“, kiu komisiis lin...

Ankoraŭ la mondo ne ekkonis, kiom profunda estas la bazo de lia parolo, kiam li diris:

„Kiu *min* ne *amas*, tiu ne *faras* laŭ miaj vortoj; kaj la vorto, kiun vi audis, estas *ne mia*, sed de la *Patro*, kiu min sendis.“

Lia *surtera ekzistado* estis lia „instruo“, kaj lia *vivo* estis la solvo de ĉiuj enigmoj entenataj en la tera vivo de l' homo. – –

Sed nur kiu scias *ami* tion, kio tie ĉi aperis surtere, povos sperti tiun solvon en si mem. – –

Li, kiu estiel la *plej granda el ĉiuj amantoj* paŝadis sur la tero kaj eĉ *hodiaŭ* vivas en sia spirita formo en la spirita protektosfero de la tero, – li, kiun la *amo* tenas ĉi tie „ĝis la maturiĝo de la mondaĝo“, – ne *povas* malkaŝi sin mem al iu, kiu ne scias malfermi al li sian koron per *amo*. – –

Sed tiu, al kiu li sin malkaŝas en lia koro, vere ne plu dubos, ke la *releviĝo* doniĝos ankaŭ al *li*, – la

sama releviĝo, kiu doniĝis al la alta majstro, kiam lia surtera *ago de amo* estis plenumita. — — —

Forlasu ĉiun supersagacan dubadon, kiu celas malheligi al vi la radiante luman *veron* de la malnova sankta sciigo!

Certe, tiu sciigo atingis nin nur post kiam multaj, kopiante ĝin, volis vidi en ĝi la konfirmon de *sia* erara opiniado kaj tial metis la vortojn tiel, kiel la vortoj laŭ ilia opinio devas stari, ĉar ilia malvasta pensado ne povis ekkapti, kion *veraj sciantoj* iam penis konigi per tiuj vortoj. —

Pardonu al la malsaĝuloj tion, kion ili faris, kaj provu *mem* trovi la fadenon, kiu rekondukas vin al la *vero* prakomence tie atestita!

Kelkaj vortoj eble montriĝas al vi kiel elpenaĵo de postaj homoj, sed la stelhela *vero*, kiu *tamen* troviĝas en la malnova raporto, tiam parolos al viaj koroj *des pli klare*.

Vi certe ekkonos, ke al la *releviĝinto* lia *korpo* ne povis utili, sed lia *vera* releviĝo sekve fariĝos al vi *des pli certa*, ĝis *vi mem* spertos en *vi* la ateston de tiu, kiu leviĝis el la tera ligiteco. — — —

Mi *mem* povas atesti *lin* kaj lian veran *releviĝon*, same kiel mi povus atesti la ekziston de la suno, kaj ĉiu, kiu min konas, vere scias, ke mi ne apartenas al

tiuj, kiuj estas sklavoj de frenezaj revoj kaj katenitoj de ilia fantasta iluziado. – –

Sed mi ne volas, ke oni kredu al tiuj vortoj, *antaŭ* ol oni *mem* spertis ilian veron *en si mem!*

Mi volas nur montri al ĉiuj, kiuj sopiras la *lumon* en tiu ĉi malluma tempo, la *vojojn*, kiuj faras ree atingebla al ili *mem* la altan lumon de vero; tiu lumo iam heligis la padojn de surtera ekzisto al la antikvuloj, kiuj serĉis en pia simpleco kaj ne spertis la *malhelpojn* al la kredo, kiuj konfuzas la homon de la nuna tempo.

Per tio mi povis helpi milojn; sed ankoraŭ miloj kuŝas en profunda dormo, atendente la vekon el timoplenaj sonĝoj.

Multaj ankoraŭ ne scias, ke ili *mem* povas havigi certecon al si kaj poste jam surtere spertas en *si mem* miraklon, kiu superas *ĉion*, kion la sopiro pri mirakloj iam igis homojn kredi. – –

Miaj vortoj celas *veki* ilin, por ke al ĉiuj iam montru sin la vero, – *la vero pri la releviĝo de la „Filo de homo“*. – –

Kiu ne spertas ĝin *en si mem*, al tiu ĝi estos dum lia tuta vivo nur pia legendo aŭ „parto de la kredkonfeso“.

Li apenaŭ povos kompreni, ke la antikvuloj en sia avideco je mirakloj aŭdacis doni al plej alta *spirita*

okazado alian interpreton: nome tiun de okazaĵo perceptebla per *fizikaj sensoj* ...

Nur kiam li „releviĝis“ *en si mem*, li vidis la *veron*, kiu tiutempe rezultigis la formadon de tiu bildo.

La scio de la saĝuloj

Saĝulo pleje scias *malmulton* de *tio*, kion oni surtere nomas „scio“.

Li konas *alian* manieron de sciado, kiu supozeble restas *nekonata* kaj *neeksplikebla* al multaj, kiuj sur tiu ĉi tero opinias sin „sciantaj“.

Laŭ tiu maniero li scias kun certeco, ke ne malmulto de *tio*, kion la tera intelekto nomas „scio“, pendas je tre maldika aranea fadeno kaj *ĉesas* esti „vera“ kaj „ĝusta“, tuj kiam tiu fadeno *ŝiriĝas*. –

Kaj tiu fadeno *ŝiriĝos por ĉiu unuopa homo*.

Sed tiuj starantaj ĉirkaŭ la kadavro de tiu unuopulo ne povos kompreni, ke por *tiu*, kiu antaŭ mallonge ankoraŭ *vivis* laŭ *ilia* maniero, *ŝiriĝis* la fadeno, je kiu nun kiel antaŭe pendas *ilia* tuta tera scio ŝajne tiom sekure ...

Ili ne suspektas, ke *por li*, kies rigida korpo postrestis, nun ĉio, kio *por ili* ankoraŭ restis pendanta je *ilia* aranea fadeno, falis en tenebran abismon, kie la fluego de forgeso forlavas ĝin, same kiel ĉion eluzitan, kio, farinte siajn servojn, putras kaj malkomponiĝas.

Tiu, kiu forlasis la teron, ankoraŭ volas *scii*, sed ĉar lia antaŭa scio perdiĝis por ĉiam, li tre baldaŭ

serĉas *alian* scion, kiu *ne* pendas je maldika fadeno kaj validas nur tiom longe, ĝis la fadeno ŝiriĝas. –

Sed utilos al li malmulte, ke li volas tiel scii, dum li ankoraŭ estas blindigita de la brilo de l' scio nun *perdita*, pri kiu li iam estis tiom certa ...

Utilos al li malmulte, ke li serĉas la *novan* scion *en malnova maniero* ...

Li tiel akiros nur scion, kiu *ree* pendas je maldika fadeno same kiel antaŭe lia *tera* scio, kaj eĉ se la scio, kiun li nun akiras, ŝajnas al li certigita por *multe pli longa tempo* – ankaŭ *tiu ĉi* fadeno iam ŝiriĝos. –

Tial estas bone al la homo, ke jam surtere li ekkonu, ke ĉiu scio, kiu estas *elpensata* kaj *elcerbumata*, pendas nur kiel guto da roso je tiu aranea fadeno, kiun la araneo „*imago*“ scias ŝpini inter „*ne-plu*“ kaj „*ankoraŭ-ne*“.

Ekkoninte tion, li ne plu troe fidus *tiun* specon de scio, kvankam eble li prudente utiligas la potencon, kiun *tiu* scio donas al li *tie ĉi surtere* super *teraj aferoj*. –

Antaŭsento de *alia* scio ĝermos en li: – de scio, kiu ne plu *dependas* de la aranea teksaĵo inter *ne-plu* kaj *ankoraŭ-ne*. –

Kiam ŝiriĝas por li la fadeno, je kiu pendas lia *tera* scio, oni trovos lin preta akiri *tiun alian* scion, kies

fundamentoj estas profunde ankritaj en la pra-fundo de la tuta esto ...

Vere, de tiu speco estas la scio de l' saĝulo jam dum lia surtera vivo, kaj neniu opiniu sin saĝa, kiu ne konas ĝin! –

Tiu maniero scii estas la maniero de la eterneco, la maniero, kiu iam koniĝos al ĉiuj, eĉ se ili kapabliĝos nur post eonoj levi sin super la maniero de pasema sciado. – – –

La tuta scio de la tero restas *ekstere* de sia objekto, – sed laŭ la *maniero scii de la eterneco* la *scianto*, la *objekto* de lia scio, kaj *tio sciata* plene *interpenetras*.

Nur en tiu maniero oni vere „ekkonas“.

Leĝo kaj hazardo

Ĉu estas „*hazardo*“, mia amiko, ke tiuj ĉi vortoj hodiaŭ aperas antaŭ via okulo, aŭ ĉu vi kredas, ke „*leĝo*“ devis plenumiĝi, por ke tiu apero nun estu ebliginta? –

Mi timas, ke via respondo multe dependas de la vojoj, kiujn vi pretigis al via *pensado*, por ke ĝi povu trapasi la ĝangalon de surtera spertado ...

Vi eble povas diri al mi, ke „*hazardo*“ estas por vi nur *vualita laŭleĝeco*, sed eble via respondo estas, *ke estas for de vi* la supozo, ke tie ĉi ekzistas *leĝo*.

Argumentoj estas prezentablaj por *ambaŭ* respondoj, kaj tamen vi estos tre malproksima de absoluta *certeco*. –

Sed tie ĉi certeco estas vere *aspirinda*, se vi volas iam atingi, ke vi povu ĝuste *interpreti* vian surteran spertadon. –

Certeco nun *doniĝu* al vi el miaj vortoj!

Temas pri sufiĉe konataj aferoj, kiuj nun devas unue esti tuŝataj, ĉar ni bezonas klarecon pri tio, kion ni komprenu sub la vortoj „*leĝo*“ kaj „*hazardo*“.

Vi opinias, ke „*leĝo*“ estas *kaŝita*, aŭ evidente *ek-konebla* en ĉiu tera okazado, kiu ebligas al vi kon-

kludi el *efiko* al ĝia *kaŭzo*, aŭ atendi el *kaŭzo* specifan *efikon*.

Sed kiam vi staras antaŭ *efiko*, pri kiu vi povas imagi, ke ĝi estas ebla ankaŭ *aliamaniere*, tial, ke ĝia *kaŭzo* restas *kaŝita*, tiam vi parolas pri „*hazardo*“.

Certe, vi tre bone povas malkovri *kaŭzon* de tio, ke tiuj ĉi vortoj hodiaŭ atingas vin, aŭ eĉ *tuta ĉeno* da *kaŭzoj* montriĝas al vi, kies lasta, plej proksima ero rezultigas la *efikon*, *ke* vi legas tiujn ĉi vortojn.

Sed ĉiu tia retrosekvado de ĉeno da *kaŭzoj* montras al vi, ke ĉio okazanta sur tiu ĉi tero ne povas esti malligata el la rilato inter *kaŭzo* kaj *efiko*.

Vane vi serĉas breĉon, en kiu vi povus trovi la spuron de la „*hazardo*“.

Kaŭzo estas sekvata de *efiko*, kiu mem formas la *kaŭzon* de *nova efiko*, sed nenie vi malkovras la levilon, kiu – kiel la sperto sufiĉe montras – ofte *deviigas* la linion de okazado ŝajne tiom arbitre, ke vi tiam provas kaŝi al vi mem per la vorto „*hazardo*“, kiom nesufiĉaj estas tie ĉi viaj ebloj de ekkonado.

*

Vi serĉas vane, ĉar tio, kion vi serĉas, estas *kaŝita* al via *maniero* serĉi.

Vi serĉas vane, ĉar tio, kion vi deziras trovi, ne povas esti trovata *tie*, kie vi opinias ĝin trovebla.

Ĉio, kion vi nomas „hazardo“, estas io, kio *aldoniĝis* al la linio de okazado, venante el la regiono, nealirebla al vi, de la *nevidebla* mondo, escepte se vi uzas la vorton „hazardo“ nur pro *superstiĉo*, aŭ por ĉiam havi ĉemane banalan, *ŝajnan* eksplikon pri io neeksplikebla por vi.

Kie „hazardo“ manifestiĝas, tie la „leĝo“ certe ne estas *nuligita*, sed *dua*, *alispeca* linio de kaŭzo kaj efiko *aldoniĝis* al la linio de ekstera okazado esplor-ebla al vi kaj efektivigas sian influon, per kiu la diversaj linioj de ekstera okazado ofte *kruciĝas en tre diferenca maniero* ol ke estus necese *sen* tiu influo ...

Kion vi nomas „hazardo“, tio estas nenio alia ol la efiko de impulsoj, nekonataj al vi, el la *nevidebla* mondo.

Tiuj ĉi impulsoj povas veni de tre *diferencaj* deirpunktoj.

Ili povas esti kreitaj de *inteligentaj estaĵoj*, *nepercepteblaj al vi*, en la *nevidebla fizika* mondo, de *homoj* vivantaj kiel vi sur tiu ĉi tero, kaj per la volo de altaj *spiritaj estaĵoj*.

Malantaŭ ĉiu vera „*hazardo*“ estas trovebla tia *impulso* kiel „kaŭzo“ el regiono, kiu restas fermita al via ekstera terhoma ekkonado. –

Ankaŭ en „*hazardo*“ manifestiĝas *laŭleĝeca* okazado, sed tie ĉi temas ne plu *nur* pri la leĝoj *esplorable* per la homa intelekto.

„*Hazardo*“ estas la rezulto de la *interplektiĝado* de la leĝoj de la *ekstera* regiono kaj de la *sense neperceptebla* regiono de la fizika mondo, sed ĉiam *volopulso* estas la kaŝa ekigilo. –

Ĉu tia impulso efikas en maniero *favora* aŭ *malutila* al vi, dependas de ĝiaj *iniciatintoj*, kiuj restas al vi *kaŝitaj* ...

Sed malantaŭ ĉiu vera „*hazardo*“ vi povos malkovri *volon*, kiu *mankas* en *alia* okazado, kaj vi rigardu kiel „*hazardon*“ neniun okazaĵon, malantaŭ kiu ne estas montrebla iu *volo* kun plena klareco!

*

Eble, mia amiko, vi nun povos doni alian respondon al mia komenca demando, dirante, ke vi vidas aganta nur aŭtomatan eksteran okazaĵon, aŭ ke vi povas prave paroli pri „*hazardo*“. –

Vi almenaŭ ne plu povos esti en *dubo*, kion vi respondu.

Sed mia demando servis nur por doni ekzemplon, kaj via respondo, kiel vi facile vidos, tie ĉi ne plu estas grava.

Sed ne malgrave estos por vi, se vi ekde nun lernas aparte *atenti* la „*hazardojn*“ en via vivo.

Ili estas por vi la solaj signoj, el kiuj vi povas konkludi al la speco de influoj el la nevidebla mondo, kiuj eble atingas vin en tiu ĉi tera vivo.

Se vi, laŭ la direkto de via volo, strebas al *dubindaj aferoj*, tiam la „*hazardo*“, direktita de la malaltaj inteligentaj estaĵoj de la *nevidebla fizika mondo*, ebenigos al vi la vojojn, kiuj kondukas vin al *kulpo kaj atenco kontraŭ dia aŭ homa ordo*, kaj ĉiu tago alportos al vi novan, neserĉitan *tenton*.

Sed se vi jam atingis la *vojon al la spirito*, vi ankaŭ tie ĉiam denove renkontos la „*hazardon*“, direktitan de altaj, amantaj gvidantoj el la *spirita mondo*, kiuj tiumaniere povas alporti al vi multon, kiun vi *bezonas* sur via vojo en la ekstera mondo por via *spirita* disvolviĝo.–

Ĉiu „*hazardo*“ neatendite elmetas vin al *provo*, kaj tiam montriĝos, *kien vi starigas vin mem*, laŭ tio, ĉu vi *rifuzas aŭ akceptas* tion, kion ĝi alportas al vi. –

Ankaŭ tie, kie la „hazardo“ venas al vi kiel *protektanto* kaj vi ekkonas nur *pli malfrue*, kion vi ŝuldas al ĝi, vi povos pruvi vian valoron per tio, ke vi ne senatente kontentiĝas pri tia okazaĵo, sed scias preni *instruon* el ĝi. – –

Ju pli vi *atentas* la „*hazardon*“ en via vivo, des pli *signifa* ĝi fariĝos por vi. –

Ju pli vi scias *utiligi* tion, kion la „*hazardo*“ alportas al vi, des pli vi povas *atendi* de ĝi. – –

Kion la aŭtomata irado de la „*leĝo*“ neniam montrus kiel antaŭdestinitan por vi, tio povas eniri en vian vivon sekve de „*hazardo*“ ...

La „*hazardo*“ donu al vi abundon de tio, kio alportas al vi *benon!*

Vana penado

En la nuna tempo ekzistas sennombraj homoj, kiuj konsciiĝis, ke ĉiu enhavo, kiun ili penis doni al sia vivo, rezultigis nur *portempan* plenumiĝon.

Tial ili nun serĉas alian, *por ĉiam daŭrontan* enhavon, kaj ili sentas, ke tia neperdebla enhavo devas esti iel *atingebla*, kaj ke aliaj en ĉiu epoko *povis* atingi ĝin, eĉ en ĉiu vivsituacio kiom ajn malfacila.

Estas tute pardoneble, ke oni nun kredas, ke la sopirata *daŭranta* vivoenhavo estas atingebla nur en la sama maniero kiel ĉio alia, kion oni sukcesis atingi tie ĉi surtere.

Oni opinias, ke temas nur pri la elfosado de kaŝita *scio*, kaj erare supozas, ke oni tuj posedas la sopiratan vivoenhavon, se oni nur *scias* pri la kaŝaj aferoj, kiuj ŝajne estis konataj al tiuj, kies vivo ampleksis tiun saman enhavon.

Tie ĉi oni malsaĝe intermiksas *kaŭzon* kaj *efikon*. Certe, la serĉata vivenhavo kondukus ankaŭ al nova *scio*, sed ĝi neniam povas esti *perata* per scio. –

Tial estas vere *vana penado*, se la serĉanto komencas traserĉi ĉiujn libroĉambrojn kaj esplori polvokovritajn skribaĵojn el pasintaj tempoj, kaj volonte lasas sin konduki de ĉiu mistagogo de nia tempo, – fascinite de konfuzaj iluziaĵoj kreitaj per tera, tro tera pensado, – kaj opinias, ke la „scio“, kiun povas doni nur *ŝanĝo de volo*, povas esti akirata kiel la scio pri la aferoj de tiu ĉi tero. –

*

Sennombraj konventetoj formiĝis pro la sopiro de serĉantoj trovi la iel antaŭsentitan enhavon de sia vivo.

Bonfidaj entuziasmuloj, senbridaj fantaziuloj, sed ankaŭ intence agantaj homkaptistoj atingis en tiuj rondoj la pozicion, kiun ili estis vane serĉintaj aliloke en la mondo.

La malklara espero fine trovi tion serĉatan, ree kaj ree alkondukas al tiuj rondoj novajn anojn, kaj la promesoj de tiuj nomataj „gvidantoj“ certigas, ke ne malmultaj serĉantoj persistas *eĉ tiam*, kiam ilia interno jam de longe diras al ili, ke ili vere povus fari ion pli bonan per siaj forto, tempo kaj mono. –

Estas *vana la penado* iam trovi la serĉatan daŭrontan vivenhavon en tiaj konventetoj.

Sed *portempe* ne malmultaj serĉantoj estas fascin-itaj, kaj ankaŭ ne mankas tiuj, kiuj pro la torento da grandaj vortoj perdas ĉiun *memkritikon*, tiel ke ili *ne plu kapablas* ekkoni, kiel ili trompas sin mem.

Por ili la gesto de nealirebla aroganteco de la „gvidantoj“ fariĝis la plej certa garantio de vero. –

Sed vane oni serĉos inter „gvidantoj“ kaj delogatoj eĉ nur *unu* homon, kiu *vere* atingis en si tiun *finan certecon*, kiu kontentigas ĉiun sopiradon al la antaŭ-sentita *daŭranta vivoenhavo*. –

Mi povas diri, ke el *ĉiu* de la konventetoj tie ĉi alu-ditaj, kiel ajn ĝi nomiĝas, iam venis al mi homoj severe kaj amare *desapontitaj*, por plendi al mi pri sia mizero.

Eĉ pluraj volumoj ne sufiĉus por redoni ĉion, kion tiuj suferintoj havis por raporti al mi.

Ofte mi rifuzis kredi tion rakontitan, ĝis mi ricevis *dokumentojn*, kiuj eĉ *multe superis* la raportojn ...

Mi demandis min, kiel *homoj kleraj*, inter ili per-sonoj kun *sciencaj diplomoj*, povis fariĝi viktimoj de tia malsaĝo, de tia senrespondeca animkaptado.

Kaj oni hontante konfesis al mi, ke jam antaŭ jaroj oni ekkonis sian eraron aŭ trompiĝon, sed ne havis la forton *konfesi* al tiuj, kiuj jam longe antaŭe estis ekkoninta ĝin *de ekstere*, ke oni dum jaroj lasis sin

trompi de la eraro de siaj akompanantoj, aŭ eĉ de la impertinenteco de laŭdire „sciantaj gvidantoj“. – –

Skuantaj bildoj de psika kolapso prezentiĝis antaŭ miaj okuloj, kaj hororante mi devis vidi, kiom teruraj povas esti la sekvoj, unuflanke, de nekomprenebla *kredemo* kaj, aliaflanke, de *senrespondeco* eksplik-ebla nur per *memtrompo*.

Sed ne nur el *konventetoj* venas la seniluziiĝintoj, kiuj post multjara serĉado fine rezignacie ekkonas, ke ili sin trompis.

Ekzistas ankoraŭ multaj *aliaj* manieroj fari al si *vanan penadon* kaj *malproksimigi* sin pli kaj pli de la celo de sia sopiro, dum oni eĉ opinias sin *proksimiĝanta* al ĝi per gigantaj paŝoj.

Pri ĉio ĉi mi alialoke sufiĉe parolis, kontraŭ ĉio ĉi estis sufiĉe *avertate*. –

Tro nerimarkinda, tro malmulte ĉirkaŭblovata de la spiro de mistero estas por multaj homoj la simpla pado, kiu *sola* kondukas al tio serĉata ...

Sed nun estu parolate ankaŭ pri aparte malsaĝa maniero, en kiu tro multaj serĉantoj disipas forton, tempon kaj monon, estante ĉasataj de unu trompita espero en alian, ĝis fine venas la granda sobriĝo.

Mi parolas pri la senbrida kaj pleje senelekta konsumado de ĉiaj libroj kaj skriboj, kiuj iel rilatas al la okulta regiono, aŭ nur per siaj titoloj promesas informojn pri okultaj aferoj.

Sed mi tute ne volas estigi la miskomprenon, ke mi opinias danĝera ĉiun legadon de tiu speco de publikaĵoj.

Tamen, neniuj, kiu certgrade konas la situacion, konstatos mian malpravecon, se mi diras, ke supozeble en malmultaj regionoj de la literaturo ekzistas *tiom da aĉaĵo* kaj *fusaĵo* kiom inter la libroj kaj skriboj, kiuj celas priskribi okultajn aferojn.

Tio estas ligita kun la temo mem.

Temas pri aferoj, pri kiuj en ĉiu tempo *nur tre malmultaj* homoj kapablis doni *sekuran informon*, sed pri kiuj en ĉiu tempo *sennombraj* homoj sciis multvorte *fabeli* el sia propra konfuza fantazio.

La afero fariĝas danĝera per tio, ke nur spertulo povas ekkoni, kie oni parolas pri aferoj, kiuj havas bazon realan, kvankam ofte malfacile ekkoneblan, kaj kie komenciĝas la plej konfuza fabelado.

Alia danĝero konsistas en la fakto, ke ekzistas en tiu ĉi kampo sennombraj libroj, kiuj estas nenio alia ol rezultoj el la legado de kvar aŭ kvin aliaj, tiel ke

estiĝas ŝajna konfirmo, kiu ofte trompas kaj enkaptas novulojn.

La trian danĝeron mi vidas en tio, ke iu aŭ alia tre konsiderinda aŭtoro prezentas, kun plena praveco, nur la rezulton de sia propra, spekulative akirita ekkono, sed, estante penetrita de la laŭsupoza „ĝusteco“ de sia prezento, li tiam parolas en tono, kiu facile igas la leganton kredi, ke li parolas pri neŝanceligeble certigitaj enrigardoj en la plejinternon de l' esto, kiuj estas ĉiutempe eblaj nur al tre malmultaj homoj.

Ĉiu konanta la literaturon pri okultaj aferoj trovos multon da ekzemploj de ĉio, kion mi tie ĉi nomas danĝera.

Sed la serĉanto plue kaj plue aĉetas, kaj eble eĉ kunportas en ĉiu poŝo traktaĵon, kiun li rigardas kiel netuŝeblan „evangelion“.

Tiel kolektiĝas nepriskribeblaj „bibliotekoj“, kaj ĉiu komenciĝanta malkontentiĝo estas rapide sufokata per la akiro de *nova* libraĉo.

Nu, ni tamen supozu, ke ĉiu el tiuj libroj, tiom odorantaj je „negoco“ en la plej *malbona* senco, entenus la nuran veron.

Tiam la enhavo eble estus pli aŭ malpli valora studmaterialo kaj povus plivastigi la scion de la leganto. Eble li povus ankaŭ trovi konsilon pri tio,

kiel li konduku sian serĉadon de la sopirata *daŭranta vivoenhavo* por iam *atingi*, kion li alstrebas. Sed kion ajn la leganto ekscias rilate okultajn aferojn, supoze ke *fakte* temas pri la fina vero, tio povas alporti al li ja *pliriĉigon de lia scio*, sed neniam la *sopiratan vivoenhavon mem*.

Tiun ĉi vivoenhavon alportas nur la instruo de la malmultaj, kiuj en ĉiu tempo *sciis* pri ĝi kaj pri la maniero atingi ĝin, kaj tial *kapablas* instrui, kiel ĝi *povas* esti atingata. — — —

Tiu ĉi vivoenhavo estas atingebla por *ĉiu* homo, indiferente, ĉu li aŭ ŝi kredas esti informita pri ĉiuj regionoj de tio okulta, aŭ respektoplene atendas antaŭ aferoj ankoraŭ ne konataj, ĝis la naturo mem pretas senvualigi ilin. —

Almenaŭ oni sciu, ke la penetrado en procezojn vualitajn de mistero estas utila *nur tiam*, se ĝi kondukas al pli granda *respekto* antaŭ tio, kio *plue* restas kaŝita. —

Sed *esence grave* estas por la homo *nur*, ke li sciiĝu pri *tiuj* aferoj kaj interrilatoj, kiuj povas movi lin *transformi sian propran vivon*, tiel ke li finfine fariĝu *atingebla* por la helpo el la regno de la spirito, helpo kiu levas lin al lia *eterna* konscio jam dum la surtera vivo. — —

Tiu ĉi *eterna konscio* estas ne nur nova konscio-*enhavo*, sed samtempe nova *speco de konscio*...

Tie ĉi plu nenio povas veni *de ekstere*, kaj homo atinginta tiun *konscion* ekde nun trovas ĉiun konfirmon *en si mem*. –

Ankaŭ la *instruo* fariĝas superflua, tuj kiam oni atingis la celon, ĉar nun ĉio, kion ĝi devis peri kaj prezenti per *vortoj*, estas *eterne ĉeestanta* kaj *ĉiutempe konsciata*. La antaŭsentita kaj tiom sopirita *vivo-enhavo* estas por ĉiam trovita. –

Estis *vana penado elpensi* ĝin.

Estis *vana penado* serĉi ĝin en *malnovaj foliantoj*.

Estis *vana penado* konfidi sin al „*blindaj kondukantoj de blinduloj*“.

Fine estis *vana penado* atingi la daŭrontan *vivo-enhavon* – kiu estas nova *esto* – per pli granda *scio* pri la misteraj aferoj, kiujn la naturo tenas al ni sub densa vualo, kaj kiuj *neniĝas* por ni en la *sama* tago, en kiu *la sensoj de nia tera korpo* devos ĉesi sian servon. – –

Okultisma karnavalo

La stranga emo kaŝi sin sub masko kaj fari diversajn petolaĵojn maskovestite, povas, kiel oni scias, dum certa tempo de l' jaro senbride kontentigi sin, kaj kie oni tion faras kun sprito kaj humuro, tie oni spektas volonte tiun frenezetan ludadon, eĉ se oni ne sentas la plej malgrandan inklinon partopreni en ĝi.

Estas ja nur mallonga tempo, dum kiu la petolado havas liberecon, kaj da seriozaj tagoj ĉiam ekzistas sufiĉe.

Danĝera fariĝas la emo al masko kaj trompa vesto nur tiam, kiam ĝi nebrideble agadas en sferoj de la vivo, kie ĝi estas tute malkonvena.

Tia sfero, en kiu la karnavalo evidente ĝuas *permanentan rajton*, ŝajnas esti la nuntempa *okultismo*, malgraŭ la seriozeco kaj honesteco de la serĉantoj, kiuj tie ĉi penas trovi kontentigan solvon de la enigmoj de l' vivo.

Oni bezonas nur trarigardi la malpli novan kaj plej novan okultisman literaturon – kiom estas ankoraŭ eble pro la superabundo de produktoj de nekompetentuloj sur tiu ĉi kampo – por ekvidi la plej frenezajn karnavaladon.

Sed tiu sovaĝa alivestiĝo sin prezentas kun la ambicio esti prenata *serioze*, kaj tial la afero fariĝas danĝero por multaj homoj.

Kun tute nekredebla impertinenteco oni praktikas la plej ridindan trompadon kaj prezentas ĝin kiel la veran „magion“, – kun senekzempla aroganteco la agantoj de tiu karnavalado postulas, ke oni rigardu ilian senvaloran brilajon kiel oran brokaton kaj veran juvelaron.

Kiom ajn triviale kaj facile travideble la trompantoj kondutas: – ĉiu nova gesto ilia ĉiam trovas sian kredantaron.

Se estus nur la *homoj mense nekapablaj fari siajn proprajn juĝon kaj decidon*, kiuj sekvas ĉiun arlenon, kiu frapas per klakbatilo sur sian magian sakon, asertante, ke li portas en ĝi la „ŝtonon de la saĝuloj“, tiam oni eble povus kompreni tion, sed restas nekompreneble, ke tro ofte lasas sin kapti ankaŭ homoj, kiuj en ĉiu alia okazo fanfaronas pri sia kritika skeptikeco. –

Kie estas la *respekto* antaŭ la *saĝo de la plej grandaj homoj* iam paŝintaj sur tiu ĉi tero, se oni povas lasi sin kredigi, ke iu obskura aventurulo scias pri la *sekretoj*, kiujn tiuj granduloj penis esplori dum

sia tuta vivo kaj malkaŝis nur al homoj kapablaj *kompreni* ilin?

Ĉu oni *vere* kredas, ke la saĝo nuntempe fariĝis tiom *malmultekosta*, ke oni devas disvendi ĝin por subvalora prezo laŭ la sezonfina stilo de magazenoj, por trovi aĉetantojn? –

Ĉu vere ekzistas hodiaŭ cerboj povantaj toleri la penson, ke la *unuiĝo de l' animo en Dio* estas atingebla per *okultismaj „ekzercoj“* de iu speco, kaj ĉu oni *vere* estimas la homojn *atingintajn* tiun unuiĝon tiom malmulte, ke oni opinias ilian plej sekretan agadon senvualigita, nur pro tio, ke iu skribinto de traktaĵoj, bezonanta monon, asertas, ke li kiel elektito tute ekzakte eksciis tion en cirkonstancoj pli aŭ malpli misteraj?

Oni preskaŭ inklinas pensi, ke la plej multaj homoj senreste perdas sian sanan juĝkapablon, tuj kiam ili eniras en la regionon de l' okultismo ...

Tie oni akceptas kiel *kontantan monon* ĉion, kion oni unuavide ekkonus kiel *senvaloran ludmarkon*, se oni ne troe fidus la fanfaronan babiladon de tiu, kiu provas persvade trudi al oni tiun vantatan senvaloraĵon kiel puran *oron*.

Ŝajnas, ke la kredemo havas neniun limon, aparte tiam, kiam la laŭdira „inicito“ scias forpremi ĉiun

demandon pri lia etika kvalito per belaj paroloj pruntitaj de aliuloj.

Se li ankaŭ trompe pretendas havi larĝan *scion*, kredigante al senspertuloj, ke parolas al ili homo, kiu primajstras ĉiun sciencan, tiam la senrespondeca ĉarlatano povas permesi al si preskaŭ *ĉion*, sen esti *ekkonata* sub sia masko.

Bona sliparo kaj ampleksa librokesto entenanta okultismajn libraĉojn el nova kaj malnova tempoj pleje formas la tutan bazon de la laŭsupoza scio de tia fanfaronulo, kaj nur la fakto, ke liaj anoj tute ne konas tiun dubindan literaturon, protektas lin kontraŭ senmaskigo. —

Ne necesas tie ĉi eksplicite indiki apartajn okul-tismajn arlekenaĵojn.

Ĉiu, kiu atente observas tiun karnavaladon, sen lasi sin imponi per aŭdacaj kaprioloj, baldaŭ disponos pri sufiĉe da ekzemploj, kaj se li deziras, li povas lerni distingi *tutajn kategoriojn* de ĉiam *revenantaj* maskiĝoj.

Li povas renkonti tre strangajn figurojn, kaj se ne mankas al li *humuro*, tiam liberiganta *rido* ofte helpas al li eligi sin el sia komprenebla indigno.

Sed *kompato al la homo kaj honto pro li* ekkaptos la observanton, kiam en tiu groteska agado li renkontas tiujn, kiuj *mem kredas* je sia maskiĝo kaj ne plu scias, ke ili troviĝas nur en *maska kovraĵo*. – –

Ju pli oni lernas travidi ilian tutan brilaĵon, kiun kelkaj el ili portas kun gravmiena seriozeco, kaj kiun aliaj briligas farante arlekenajn saltojn, des pli oni estas protektata kontraŭ tio, ke oni sentas sopiron al tia kompanio ...

Tie ĉi estas la okupiĝejo tre ŝatata de ĉiuj ‚elreligiintoj‘, kaj iu aŭ alia, kiu vestite en burleska mantelo de magiisto ludas en tiu ĉi kampo sian mizere banalan rolon, venis al tiu farado tial, ke li *malsukcesis en la ĉiutaga vivo* kaj tuj antaŭ sia kolapso kredis ekvidi sian savon en la kampo de l’ okultismo.

Por tiaj homoj *neceseco* fakte „leĝojn ne konas“, kaj kiom ajn malproksime estas al ili komence, *mem kredi* je tio, kion la prezentado de ilia masko postulas de ili, tamen la devigo de ilia situacio iom post iom sekvigas, ke ili virtuoze kapablas estigi la *impreson*, kvazaŭ ili vere estas trapenritaj de plej profunda kredo.

Ankaŭ *tio* ja estas parto de la vera *karnavalo*, kie la masko sukcesas nur tiam, kiam ĝia portanto scias zorge teni sin mem kaŝita sub ĝi.

Se ne ree kaj ree homoj *honeste serĉantaj* estus erarigataj per tiu farado, oni povus senatente preterpasi ĝin. Sed tie ĉi *animoj* estas en danĝero, kaj kvankam la plej multaj el tiuj, kiuj dum jaroj ne rimarkis, ke ili vivas en konstanta karnavalo, fine spertas la sobrigan „Cindromerkredon“, tamen la amara scio, ke ili disipis valoran tempon de sia vivo, restas por ili konstanta inhibicio, eĉ se ili poste ekiras la solan vojon, kiu povas konduki ilin al la plenumiĝo de ilia origina sopiro.

Tiam ili ĉiam denove devas konfesi al si mem, ke ili lasis sin trompi *proprakulpe*, ĉar tie ĉi estas senkulpa *neniu*, kiu lasis subpremi sian juĝkapablon tiugrade, ke li povis konfuzi la maskeradon kun la *vojo al vero*. –

Kiu en la ĉiutaga vivo fidas ĉiun reklaman laŭdon, sen unue *ekzameni*, ĉu ĝi fidon *meritas*, tiu ne plendu, se li devas toleri ne nur la *damagon*, sed ankaŭ la *mokon*.

Sed kiom pli la *devo* ordonas unue *ekzameni*, antaŭ ol oni sekvas iun, se de tiu sekvado dependas la bono aŭ malbono de la *animo*, kiu sopiras al lumo kaj klareco!

Oni vere ne bezonas multon da sagaceco por ek-konscii, ke la *spirito de Dio*, kiu sin *unuigu* al la

homa spirito, ne estas *superruzebla* per lerneblaj „metodoj“ de okultismaj sekretemuloj!

Tian superruzadon per iaj, pleje *corpaj* „ekzercoj“ celas ĉio, kion la karnevalaj magiistoj, tre mizere imitantaj la faman CAGLIOSTRO^{*}n, havas por oferti al siaj sekvantoj.

Do la dezirego atingi en *malhonesta* maniero ion, kion oni opinias *tro malfacile atingebla sur rekta vojo*, logas novajn kaj novajn viktimojn en la retojn de vantaj ĉarlatanoj.

Tio aplikiĝas ankaŭ al la avido *sperti strangajn aferojn*; sed tie ĉi oni plene forgesas, ke eĉ la plej mistera okazaĵo spertebla per la *fizikaj* sensoj *perdas* ĉiun valoron, tuj kiam tiuj sensoj *ĉesas* sian servon ...

Kiu ne forĵetas de si ĉion, kio *kaŝas* lin – tia, kia li povas eterne restadi en la *spirito de Dio*, en ĉiama *esto* – antaŭ lia tera konscio, tiu ne *povas* unuigi sin kun sia *vivanta Dio!*

Kiel do povus iu homo iam esperi, ke li atingos tiun *unuigon por ĉiam kaj eterne*, se li ankoraŭ eĉ kovras sin per ĉiuspeca *maska fatraso?*

En tiu maniero li povas vekti nur fortojn, kiuj baras al li la *vojon al Dio* tiel, ke ĝi fariĝas por li *neirebla*, ĉar nur *homo vere unuigita kun Dio* scias *superi* per

* [kaljóstro] – sicilia aventurulo (1743-1795)

spirita forto la mallumajn potencojn, kiujn la mal-saĝulo vekas el ilia dormo, supozante, ke per ilia helpo li povas levi sin al alta, dia ekkonado. — —

Nur senscia homo povas facilanime kontesti la ekziston de tiuj mallumaj potencoj.

Sed kiu klaraokule rigardas en la mondon, renkontos tre, tro ofte iliajn pereigajn spurojn. Mem konante ĉiun maskiĝon, ili estas la veraj nevideblaj fadenmovantoj de la marionetoj en la okultisma karnavalado. — — —

Internaj voĉoj

Jam la plej malnovaj raportoj de la homa historio sur tiu ĉi planedo rakontas pri unuopaj homoj, kiuj en certaj horoj, okazoj kaj lokoj aŭdis paroladon de „voĉoj“, kiuj estis percepteblaj *sole nur al ili*, kaj tiu parolado estis interpretata depende de la profundeco de interna ekkonado de la aŭdantoj, kaj depende de la imagaro de ilia religia kredo.

La aŭdanto havas neniun dubon pri tio, ke la voĉo parolanta al li apartenas al alia estaĵo, kiu estas tre klare distingebla disde li mem.

Kun plej firma certeco li rifuzus la supozon, ke li nur dialogas kun si mem, kvazaŭ „dramigante“ sian propran pensadon, kvankam vere ekzistas homoj, kiuj *tiamaniere* estigas *al si mem* internan alparolon kaj firme kredas, ke ili estas instruataj de iu spirita estaĵo.

La kapablo de sekura distingado en tiu ĉi kampo estas akirata nur per *propra spertado*, same kiel vera konanteco en la regionoj de *arto* estas atingata neniam sole per instruado, sed antaŭ ĉio per riĉa *sperto*.

Kiu sufiĉe ofte perceptis en si *verajn* internajn voĉojn, tiu certe ne plu estos trompata de *memkreita* interna alparolo.

Sed multe pli malfacile estas, akiri sufiĉan certecon rilate la *kaŭzintojn* de la voĉoj aŭditaj.

Tie ĉi, kredemaj homoj estas tro volonte pretaj, kredi je plej alta spirita aŭtoreco, aparte se ankoraŭ mankas al ili la ekkono, ke ekzistas *plejdiversvaloraj* nevideblaj estaĵoj, kiuj povas atentigi pri si per interna alparolado. Homoj, kiuj estas tiom plene liberaj de vanteco kaj aroganteco, ke, kontraŭe, senbazaj sentoj de malplivaloreco preskaŭ premas ilin teren, tiam subite ŝanĝiĝas en la malon: – ili sentas sin „instrumentoj de Dio“ kaj nun ordone postulas de ĉiuj homoj la plej altan respekton surbaze de sia laŭsupoza gracofavoriteco, tute ne sciante, ke ĝuste tiu konduto plej klare evidentigas, kiom trompaj estas la internaj voĉoj, kiujn ili aŭskultas.

Ĉiam denove oni povas observi, ke ankaŭ homoj de tre skeptika naturo perdas ĉiun *memgardecon*, tuj kiam tiu interna sperto, kies eblecon ili antaŭe kuraĝe kontestis, venas *al ili mem*.

Kion ajn la voĉo interne aŭdata nun diras, tion ili blinde kredas, kaj plej volonte oni kredas al ĝi, kiam ĝi diras pri si mem, ke ĝi apartenas al tre alta spirita estaĵo, aŭ eble estas eĉ la voĉo de la Dieco.

Se tiam sekvas la sciigo, ke la aŭdanto havas altan „mision“ por plenumi kaj devas senti sin kiel elektiton por feliĉigi la homaron per aparte ordonita

verko, tiam estas definitive forigita ĉiu inklino kritiki la internan voĉon, kvankam oni ankoraŭ atingis nenium alian certecon, ol ke fakte parolis *voĉo*, kaj ke ekzistas nenia garantio, ke ĝi estas la voĉo de *tiu*, pri kiu ĝi asertas, ke li estas la parolanto. –

Sed la aŭdanto de la interna voĉo estas preskaŭ en la sama situacio kiel homo, kiu ricevas *telefonan* alvokon.

La alvokanto povas esti granda fripono kaj tamen doni al si la plej altajn titolojn, ĉar li bone scias, ke li havos ŝancon atingi sian kriman celon nur tiam, se li prezentas sin kiel personon, kiu ĝuas la konfidon de la alvokato.

Kiu, krom homo tute malsaĝa, plenumus gravan komision *reage al nura telefona alvoko*?

Ĉu ne ĉiu iom memgarda homo unue provus havigi al si *certecon*, antaŭ ol akcepti postulon ricevitan per nura telefona alvoko de nekonato?

Ankaŭ homo alvokata en sia *interno* ne vidas la alvokanton kaj havas nenian eblon kontroli la verecon de la informo, escepte se li jam estas *informita* pri certaj *karakterizaĵoj*, per kiuj ĉiu provo de trompado tuj malkaŝas sin.

La plej gravaj de tiuj karakterizaĵoj nun estu koncize riparolataj.

Unue:

Kiu kredas aŭdi en sia interno „voĉon“, kiun li sentas apartenanta al estaĵo nevidebla al li kaj klare distingebla disde li mem, tiu komprenu, ke ekzistas *nenombreblaj* nevideblaj estaĵoj de *plej diversaj* kategorioj, kiuj, en difinitaj cirkonstancoj, povas fari sin percepteblaj al li per interna parolado, kaj ke la plej multaj de *tiuj* nevideblaj estaĵoj, kiuj *plej facile* povas tiel aŭdigi sin, havas plej danĝeran naturon, tiel ke li devas uzi sian tutan forton por ne fali sub ilian influon. –

Treege malofte okazas, ke vere *spirita* estaĵo, kiu laŭ sia speco rangas *super* la terhoma spiriteco, „parolas“ en la interno de homo, – kaj *kie* tio *fakte* okazas, tie la jam atingita, *tre alta spirita ŝtupo* de la aŭdanto devas *ebligi* tion. –

Se oni scias, ke oni ankoraŭ *ne* estas sur tiom alta spirita ŝtupo, tiam oni rifuzu *ĉiun* internan voĉon decide kaj firme, kiom ajn deloge ĝi eble provas havigi al si konfidon!

Due:

Ĉiu „voĉo“, kiun oni sentas venanta de nevidebla estaĵo, estas *tuj ignorenda*, se la vortoj komunikataj estas percepteblaj ne nur al la interna *spirita*, sed ankaŭ al la ekstera, *fizika* aŭdado.

Tie ĉi temas, en la plej bona okazo, nur pri *nerva perturbo* de sufiĉe grava naturo, kaj estas konsilinde serĉi senprokraste la helpon de *kuracisto*.

Sed temas pri multe pli malfavora stato, se la nevideblaj estaĵoj de la fizika mondo jam sukcesis ekposedi sian kompatindan homan viktimon tiamaniere, ke, eĉ se klinike pruvebla nerva perturbo *ne* ekzistas, tiaj voĉoj estas perceptataj kiel *ekstera sono*. –

Tie ĉi helpas neniam *batalado*, sed nur *plena ignorado* konsekvence praktikata dum longa tempo.

Oni evitu ĉiun lokon kaj ĉiun okazon, kiuj antaŭe ŝajnis favori la aŭdadon de tiaj voĉoj!

Definitiva liberigo certe estas *ebla*, sed ĝi kondiĉas, ke la „obsedito“ *nepre ne* plu donu al tiuj voĉoj *ian* atenton, sed anstataŭe rigardu ilin tute same kiel iun alian negravan bruon.

Li aparte gardu sin kontraŭ ĉia *sento de timo*, sed li ankaŭ evitu adopti malamikan *memtenon de batalanto* kontraŭ la voĉoj.

Kion ajn ili volas diri aŭ eĉ „ordoni“ al li, tion li devas lasi *neatentita*, kaj li *neniam* devas eĉ nur *pri-pensi* la sencon de iliaj komunikoj!

Intensa laboro, prudenta aktivado en la libera aero, estado en bona kompanio, kaj kiom eble *eviti esti sola* estas esencaj rimedoj por liberigi sin de la nedezirata nevidebla parazitaro.

Ĉiu, kiu estis ekokupata de ili, povas esti feliĉa, se li per *persista ignorado* de la manifestiĝoj fine sukcesis refariĝi *libera kaj mastro de si mem*.

Trie:

Oni tuj montru *la plej akran malkonfidon*, kiam interna voĉo donas ordonon, aŭ parolas al tiu interne aŭdanta pri „*tasko*“ aŭ „*misio*“, kiun li devas plenumi en sia vivo! –

Homoj, kiuj *vere* plenumu surtere taskon, mision aŭ ion similan, ricevas sian spiritan komision en *tre* diferenca, *sobre tereca* maniero, kaj ili *neniam* estus pretaj fari laŭ la ordono de „interna voĉo“ tion postulatan de ili fare de tiuj, kiuj *solaj* estas la rajtigitoj de la spirito sur tiu ĉi tero ...

Resumante oni povas diri, ke estas nepre *rifuzenda ĉiu* interna voĉo, kiu havas por diri *ion alian* ol tion, kio utilas por *pli alta spirita disvolviĝo*, por *klarigi la internan komprenon*, kaj por la *pliboniĝo* de la *aŭdanto*.

Neniam voĉo el la eterna regno de l' pura spirito influos homon kun la celo, ke li siaflanke influu siajn kunhomojn en iu rilato!

Ĝi disvolvos nur la spiritan *amon* al la kunhomoj, sed en ĉiu unuopa okazo ĝi *lasos la homon interne instruitan agi* el tiu amo laŭ *sia volo* kaj laŭ *sia forto*.

Sed ankaŭ alta *spirita* gvidado vere povas manifestiĝi kiel *interna voĉo*, kiu tiam, en la lingvo de la homo tiel gvidata, fariĝas aŭdebla en klara parolado.

Tamen tia parolado estas aŭdata nur en la plej-interno, en la *spirita* organismo, de l' homo, kvazaŭ tio nekonata, kio parolas en li, estus nur *lia propra plej interna interno*, ĉar nur *tra* tiu plejinterno de l' homo veraj *spiritaj* estaĵoj povas fari sin percepteblaj al li *en spirita maniero*. –

La groteskaj okultismaj iluziaĵoj, ĉie agantaj en tiu ĉi tempo por konfuzi la animojn, nutras veran *avid-econ* percepti en si „internajn voĉojn“, kaj la fenomeno estas tiom dezirata, ke oni volas sperti ĝin je kia ajn kosto.

Precipe tiu *avideco* de la homoj ebligas al la lemuraj estaĵoj de la nevidebla fizika mondo atingi respektiĝon kaj fariĝi kaŭzantoj de la fenomeno tiom arde dezirata.

Ne aliamaniere ol la parazitoj de la *videbla* fizika mondo, tiuj en la *nevideblaj* regionoj plej volonte ek-nestas *tie*, kie ili trovas malpuraĵon, aŭ almenaŭ mal-lumajn lokojn mucidajn. –

Kiu do volas resti libera de tiu nevidebla kanajlaro, tiu zorgu en si mem pri *plej alta pureco* de sia *pensado* kaj de sia *vivo de instinktoj kaj imagado!*

Se li penas fari tion, tiam li apenaŭ subfalos al tiu avideco je internaj sensacioj, kiuj jam kondukis tiom multajn al plena interna ruiniĝo.

Tiuj homoj, kiuj estis preparataj por percepti en si vere *spiritajn* internajn voĉojn kaj sekve vivis sub alta gvidado, *neniam* estis *strebinta* al la aŭdado de internaj voĉoj, – sed ili ja estis peninta, per multjara laboro je si mem, *elradikigi erarojn en si kaj forigi siajn malperfektaĵojn*.

Tiel ili fine estis atingintaj la ŝtupon, kiu ebligis al alta spirita amo fari sin perceptebla al ili en ilia plej-interno.

Nur tiuj ĉi spiritaj voĉoj de la *amo* estas vere feliĉigaj por la tera homo!

Nur *tiuj ĉi* internaj voĉoj povas gvidi lin al lia *plej alta celo!*

Ili venas *nevokite* kaj *nepostulite*, tuj kiam la homo spirite strebanta estas *atingebla* por ili.

Sed por la voĉoj de la *nevideblaj lemuraj estaĵoj de tiu ĉi fizika mondo* estas atingebla ĉiu homo, eĉ se li staras sur *plej malalta* spirita ŝtupo ...

Nur *forturniĝo* kaj *plena ignorado* povas *protekti* kontraŭ ili, kaj ĉi tie ĉiu homo devas zorgi, ke li kreu al si tiun protekton! –

Ĉiu devas scii, ke nur li *mem* povas protekti sin, kaj ke eĉ la plej alta spirita potenco de *aliulo* kapablas

fari nenion por li, dum li ankoraŭ avide kaj frivole *ludas* kun la danĝero. – –

Tie ĉi, nur *kuraĝo* kaj *deciditeco al plena forturniĝo* vokas spiritan helpon, se ĝi estas necesa.

La magio de timo

Pli grandnombra ol ĉiuj religiaj komunumoj sur tiu ĉi tero estas la tutmonde disvastigita kumunumo de nekonsciaj *magiuloj de la timo*.

Ili ne scias, ke ili praktikas *magion*, kaj multaj eĉ ne suspektas, ke ili faris la *timon* ilia dio, sed ilia tuta *pensado, parolado kaj agado tute nenecesigas*, ke ili *scias* pri tio, kion ili faras, aŭ ke ili *suspektas*, kiel ilia fido estas *ligita de la timo* ...

Certe, oni ĉiuloke aŭdas grandajn *vortojn* de alta *kuraĝo*, kaj se oni volus kredi al la fiera *gesto*, kiun tro multaj lernis firme primajstri, tiam oni povus facile supozi, ke ĉiu *timo* estas *malaperinta* el la mondo.

Sed tie ĉi, malplenaj *vortoj*, malplenaj *gestoj* vere signifas nenion, kaj tiu, kiu havas nur la *kuraĝon de malespero*, per tio tute ne pruvas, ke li ne agnoskas la *timon*.

Eble multaj homoj estas *vere* sentimaj en certa rilato, kaj tamen ili estas *sklavoj* de la timo, tuj kiam ili forlasas *la kampon*, sur kiu ili per memedukado sukcese lernis rezisti la timon. –

Nur malofte oni trovas homon, kiu ne cedas eĉ unu regionon de sia vivo al la timo.

Je preskaŭ ĉiu homo timas ion.

Iumaniere eĉ la plej kuraĝa homo kaŝe karesas la timon.

Tio apartenas al la homa naturo depost praa tempo kaj herediĝas plu de generacio al generacio.

Neniu bezonas honti pri tio, ke de tempo al tempo la timo atakas lin, – ke ĝi celas devigi lin, ke li fariĝu ĝia servutulo.

Sed la homo *povas lerni*, kaj *lernu, defendi* sin kontraŭ tia atako!

La atakato lernu *ekkoni*, ke la timo alportas al li *damaĝon* nur per *lia propra* potenco, devigante lin uzi la magian forton, kiun li nekonscie *posedas*, en *tia* maniero, ke li *mem altiras* la malfeliĉon, kiun li timas!

Neniam la timo povas esti certa pri tiom facila predo, ol en tempoj de peza elprovado, kiam neniu scias, kiun novan malbonon la venonta tago alportos al li.

Certaj *sekvoj de pli frua okazado ne estas haltigeblaj de iu potenco de la tero aŭ de la ĉielo*, kaj kie malĝusta konduto preparis *malbonon*, tie ĝi devas esti *trasuferata*, kiom ajn forte oni eble *defendas* sin kontraŭ ĝi, – ĉu oni kapablas *kompreni* la profundajn interrilatojn, aŭ ne. –

Delogite de falsaj konkludoj de lia pensado, la homo *mem* nun donas al la *timo* ĉiujn rajtojn kaj ne suspektas, ke li tiel per sia propra forto ankoraŭ centoble *pligrandigas* la *malbonon*, *kiun li ne povas eviti...*

Memvole ĉiu metas sian magian forton en la *servon* de la timo, kaj kiam li perceptas la *efikon*, li opinias, ke li ricevis *konfirmon* pri la nigra kredo, kiun la timo sukcesis vekti en li.

Sekve neniu fino de l' malbono estas antaŭvidebla, ĉar senĉese *nova* malbono estas *magie elvokata*. –

Forta volo, kiu povus tre baldaŭ ŝanĝi ĉion al *pli bona* stato, estas *misuzata* por plilongigi la regadotempon de la malbono. – –

Katenite kaj blindigite de la timo, neniu el la multaj, kiuj tiumaniere nenecese *plimultigas* la malbonon, kredas je *sia propra magia forto*, per kiu li samamane povus *ĉesigi* la malbonon, se li estus preta unue forpeli el si la *timon*. – –

Tie ĉi povas aperi helpo nur, se ĉiu unuopulo laŭ sia povo penas veni en si al la ekkono, ke li ne plu devas koncedi al la *timo* iun *influson sur sian kredoforton*.

Sed kiel la forto de multaj unuopuloj katenitaj de *timo* fariĝas la *kaŭzo de enorma efiko*, tiel same

ankaŭ la forto de multaj fariĝas *potence efika*, se ĉiu *forpelas* el si la timon.

Tiam la malbono estas malvastigata inter la limoj difinitaj de pli frua erarado, kaj ĝi ne plu kreskos.

La kredoforto de la multaj, kiuj *liberigis* sin de ĉiu timo, nun altiras nur la *bonon* samamaniere, kiel antaŭe la sama forto, katenita de *timo*, altiris nur la *malbonon*.

Estas kaŝita *en la regiono de ebleco* multo, kiu tamen ne venas *en ekziston*, se la kredoforto de *l' homo* ne *tiras* ĝin tien.

Tiumaniere *malbono* kaj *bono* estas atingeblaj.

Vere, ne estas vanta ludo per vortoj, se mi tie ĉi avertas kontraŭ la *magio de timo*.

Kvankam en tiu ĉi tempo la vorto „magio“ fariĝis nur laŭmoda vorto, ĝi estas apenaŭ malhavebla, se oni volas paroli pri aferoj tie ĉi tuŝataj.

La antikvuloj, kiuj ankoraŭ konis *laŭsperte* la magian forton de la kredo en la homo, parolis pri „*blanka*“ aŭ „*nigra*“ magio, depende de la *benoplena* aŭ *malbonfara* efiko, kiu manifestiĝis per la uzo de la sama forto.

Hodiaŭ oni opinias sin tute rajtigita rideti pri ilia „superstiĉo“ – kiel oni nun nomas ilian ekkonon, – kaj tamen eĉ hodiaŭ la tero portas *neniun* homon, kiu ne ekigas *magiajn efikojn per sia tuta pensado*,

parolado aŭ agado, ĉiutage kaj ĉiuhore, en sia propra vivo kaj en la vivo de sia medio. –

Sed hodiaŭ oni *scias plu nenion* pri sia potenco kaj opinias „senefika“ tion, kio ĉiam kaj ĉiuloke rezultigas plej gravan efikon. – – –

Oni serĉas la kaŭzon de l' malbono en la *ekstera mondo* kaj kontestas ĉion krom *mekanikaj* procezoj, dum oni mem *tiregas la malbonon en ekziston per sia propra forto*, uzante la *magion de timo*, kiu *altiras ĝuste tion timatan* kun la sama certeco, kiel gaja *fido* – malgraŭ ĉiu mizero – sukcesas *realigi ion sopiratan*. –

La plej malmultaj homoj hodiaŭ scias laŭ propra sperto, ke tio estas fakto, kaj tiuj, kiuj scias tion, ne dubos miajn vortojn.

Ili konas la *magion de fido* kaj jam de longe praktikis ĝin anstataŭ la magio de timo, post kiam ofte amara sperto kondukis ilin al ekkono.

Tiu ĉi *magio de fido* estas hodiaŭ pli signifa ol iam antaŭe, kaj nur ĝi povas *venki* la magion de timo.

Ne estas kontesteble, ke tiu ĉi surtera vivo povas alporti multon, kiu estas tre *nedezirata* kaj kiun oni preferus *tute eviti*.

Ankaŭ ne estas kontesteble, ke *timo* kelkfoje *gardas* kontraŭ *malĝusta agado* per tio, ke ĝi estigas imagon pri la malbona *efiko* de tia agado.

Timo povas instrui *eviti* la malbonon kaj tiel efikas kiel gardanto, kiu *prosperigas la vivon*.

Nur tiam, kiam ĝi ekscitas la *fantazion* kaj pentras plej diversajn okazaĵojn, kiuj eble *neniam realiĝas*, aŭ estas *neeviteblaj*, ĝi helpo de homa kredoforto fariĝas potenco *altiranta malfeliĉon*.

Neniam la timo povas instrui *eviti* ion, kio estas *neevitebla* kaj devas esti dissolvata per *tolerado* kaj *eltenado*.

Neevitebla malbono neniam fariĝas *pli malgranda* per tio, ke oni timas jam ĝian *minaĉon*.

Tie ĉi la timo povas nur *subfosi la forton*, kiu estas necesa por elteni tion neeviteblan tiumaniere, ke ĝi ne plene *sufoku* onin.

Sed kion oni *povas* eviti kaj tamen *timas*, tio *ŝanĝiĝas* per la magio de timo treege facile en *ion reale neeviteblan*.

Certe eĉ la *magio de fido* ne povos preventi *neeviteblan* malbonon.

Ĝia valoro konsistas en tio, ke ĝi *ne lasas eviteblan malbonon trovi la vojon el la regiono de ebleco en la realon*, – ke ĝi *deviigas* multon, kiu jam

ŝajnis minaci, – sed anstataŭe magnete *altiras* tion, kion ĝi *esperas*. –

Oni bezonas ĝin neniam *pli* ol en tempoj de grandaj *zorgo* kaj *aflikto*.

Ĝuste en *tiaj* tempoj ĝi alportas plej facile *la konfirmon de sia efikeco*.

Sed oni ne pensu, ke la homo havas la potencon *preskribi* al ĝi *la vojojn* de ĝia agado!

Ĉiam ĝi efikas *sen disipado de forto*, kaj ĉiam ĝi almetas la levilon *tie*, kie la ŝarĝo estas movebla *plej facile*. –

Eĉ se la homo *ne scias* kaj *ne povas* scii, kiel helpo estas atingebla, la *magio de fido* *kreos la helpon* por li.

Miloj tion jam *spertis*, sed ekzistas ankoraŭ *cent-miloj*, kiuj scias *nenion* pri tiu forto en la homo ...

Sed ĉiu, kiu *mem* elprovas tion, kio povas esti elprovata, estigas esperon, ke *aliaj* kuraĝos fari la elprovon, kaj helpas al la *nevideblaj* helpantoj liberigi liajn fratojn el la *magio de timo*. – –

Kiel timo iam detruis la kosman liberecon de la *spirita homo*, – kiel timo igis lin „*fali*“ el *dia lumado*, – tiel ankaŭ la ekzistado de la *tera homo* estas grave minacata de la timo. –

Kiu eĉ nur iomete helpas elpeli la konstantan timon el la koroj de homoj, tiu kunagas en la granda afero de liberigado.

Sed *libereco de timo* tute ne estas *blindeco* pri la *danĝero*.

Nur tiu, kiu *konas* minacantan danĝeron en ties tuta amplekso, povas *paŝi renkonte al ĝi sentime*, ĉar nur *li scias* kiel *alfronti ĝin*. — — —

Limoj de la ĉiopoveco

Al la malplej diskutataj, malplej pridubataj kred-artikoloj de ĉiuj homoj kredantaj je Dio, – eĉ se ilia kredo estas tre malproksima de tradicia religia ligiteco, – apartenas la frazo, ke Dio, rilate al ĉiu agado volita de Li, estas „ĉiopova“.

Iu „dio“ *sen* tia, tre tereca „ĉiopoveco“ ŝajnas al la imago malhavi la plej esencan atributon de dieco, kaj la homo multe pli facile koncedas al la dio, je kiu li kredas, *ĉiujn kruelajn instinktojn de sia propra ter-homa naturo*, ol ke li pridubus la senrestriktan *ĉiopovecon* de tiu dio.

Laŭ antropomorfisma pensmaniero oni *elpensis* sian „dion“, vidas en li, anstataŭ la *esto super la esto de estaĵoj*, nur „la plej altan *estaĵon*“ kaj nun rigardas kiel logikan postulon, ke tiu „plej alta“ estaĵo necese posedu ankaŭ nelimigitan *potencon*, alie oni ne povas agnoski ĝin kiel „*plej altan*“ estaĵon.

Per la plej ventaj sofismoj oni memtrompe intence malatentas, ke „ĉiopova“ dio, – en la laŭlitera senco de la vorto: povanta fari *ĉion*, – devus esti vera monstro, se li *trankvile tolerus* ĉiun mizeron kaj aflikton, ĉiun kruelaĵon kaj teruraĵon sur tiu ĉi tero, se li havus la *potencon forigi* ĉion ĉi, *preventi* ĉion ĉi ...

Nur kiam homo estas trafita de terura sorto kaj sentas sin senkulpe premita, li kelkfoje ekkonas la memkontraŭdiraĵon entenatan en lia imago pri Dio.

Sed tute ne ekkonante, ke *li mem* estigis tiun memkontraŭdiraĵon, al kiu *nenio reala* konformas, li nun grumbblas kontraŭ sian diable kruelan idolon, de li mem elpensitan, se li ne preferas la radikalan solvon: forĵeti ĉiun kredon je *dio*, ĉiun kredon je *spiriteco* ekzistanta *super* la homo, kiel malsaĝon kaj memtrompon.

Sur tiu ĉi tero pasas neniu tago, kiu ne vidas en sennombraj lokoj homojn, kiuj kverelas kun sia laŭsupoza dio, ĉar, kiel ili kredas, li destinis por ili ion malbonan kaj malfacile elteneblan.

Nur malvolonte, aŭ kun amara, timoplena kredo, la homo akceptas la banalan konsolon, kiun certaj kredinstruoj ankoraŭ kuraĝas prezenti al li, provante interpreti lian malmolan sorton kiel destinitan „*laŭ la neesplorebla volo de Dio*“ kaj kiel manifestiĝon de lia *amo*: –

„Kiun la *Eternulo* *amas*, tiun li *punkorektas*.“

Nur malmultaj konscias la *krudan blasfemon*, kiun tiu konsola vorto entenas ...

Temas pri vere *terura* „dio“, kiu ne scias montri sian *amon aliamaniere*; sed ankaŭ nur pri „*dio*“ *elpensita de homoj*, kiu estas trovebla *nek en la spaco de l' universo nek en la regno de l' spirito*, krom en *homaj cerboj*.

Oni povas kompreni tre bone, se homo multe premita preferas deklari, ke *ĉiu* sciigo pri iu supertereca dio estas iluzio, trompo kaj vanta revo, ol ke li povus plue kredi je „dio“, kiu *turmentas* lin „pro amo“ ...

Sed *kiom alia* ol tiu antropomorfisma *imago* pri Dio aspektas *la eterna realo!*

Al la *enhavo* de tiu imago respondas en la *realo* nur tio *ĉi*: ke Dio estas „*la amo*“, kaj ke *ĉiu*, kiu restas „en la amo“, restas *en* Dio, same kiel Dio *en li*.—

La iluziaĵon, kiu atribuas al la Dieco krude materialan „*ĉiopovecon*“, *vera Dia lumo* dissolvas en si, kiel la lumo de la tera suno malaperigas la nebulojn super marĉo.

La eterna pura *esto*, kiu sola *reale* meritas la nomon „*Dio*“, *estas unu en si mem* kaj *nedividebla*, kvankam *ĝi prezentas sin mem en infinitoblaj formoj*.

Kiel *ĝi* iam povus *nei sin mem* en iu *ajn* el siaj manifestiĝaj formoj?

En la kosmo estas nenio, kio *finfine* ne estus unu el la *manifestiĝaj formoj* de la eterna *esto*, kiu amante restadas en si mem, dum la manifestiĝaj fortoj eterne kvazaŭ rondmoviĝas ĉirkaŭ ĝi.

Tiu eterna *esto* estas *al si mem* „leĝo“ kaj „normo“, kaj ĉiuj vere *infinitoblaj* fortoj, kiuj *servas* al ĝia manifestiĝo, kvankam elpuŝitaj kaj formante *kontraŭmetitaĵon*, tamen eterne baziĝas nur en *tiu esto* kaj neniam povus rezultigi *kontraŭan* eston, la „*ekziston*“, *sen* tiu eterna *esto* ...

Do ĉiu forto estas *bazita* nur en la imanenta „leĝo“ de la eterna *esto* kaj *neŝanĝeble* entenas en si la *eblojn* de sia efikado, kvankam la *kombinaĵoj* de tiuj ĉi fortoefikoj, kiujn ni kredas esti ekkonintaj kiel „*leĝojn de la naturo*“, estas submetataj al diversaj *ŝanĝoj* dum tempoj por la homo nemezureble longaj, ŝanĝoj, kiujn la homo *ne perceptas*, ĉar la homa observado sur tiu ĉi tero ne ampleksas tiajn tempojn.

Sed *tiom longe*, dum iu kombinaĵo de fortoefikoj, – nomata de ni „leĝo de la naturo“, – ne estas *malligita*, la eterna *esto* neniam povas *nei* ĝin, ĉar ankaŭ ĝi baziĝas sole *en la eterna esto*, kiu ne povas *nei sin mem*. –

Tie ĉi estas la *limoj* de la *supozita* Dia „*ĉiopov-eco*“: – eterne *netranspaseblaj* eĉ por la eterna *esto*.

Tio signifas – parolate en la maniero de plej simpla kredo je Dio –: Dio furiozus *kontraŭ si mem*, se la Dia volo povus *agi kontraŭ* la efikado de teraj fortoj, ĉar normo kaj leĝo de tiuj fortoj originis el la *sama* Dia volo. –

En *tiu ĉi* loko, *perfekteco ne estas volata* de la Dia volo: – ne *povas* esti volata, ĉar perfekteco estas *ebla* nur en la pura, absoluta *esto*, sed ne en la *kontraŭmetitaĵo*, kiun ni nomas „*ekzisto*“.

La *unikeco* de la absoluta *esto* necese ekskluzivas, ke perfekteco povas esti atingata en la *ekzisto*.

Ĉio „*ekzistanta*“ estas nur „*reflektaĵo*“ de certa aspekto en la pura, absoluta *esto*. Kiel la tera suno povus esti nomata kvazaŭ „*perfekta*“ kompare kun ĝia spegula bildo sur trankvila akvosurfaco, tiel same nur la eterna *pratipo* de ĉiu manifestiĝa forto, kiu energias en la *ekzisto*, estas perfekta en la eterna *esto*, – sed ne la manifestita *kontraŭmetitaĵo*, kiu fariĝas perceptebla kiel *fenomeno*. –

La fenomenaj mondo povas esti influata el la Dia, spirita regiono *nur laŭ tio*, ke la Dia, spirita volo povas influi ĝin *sen kontraŭi sin mem*.

Ne estus ebla eĉ la plej milda Dia influo sur *tiu ĉi* fenomenaj mondo, se la kaŭzaj ĉenoj de okazado vere estus *tiom forte streĉitaj*, kiel homa pensado deziras supozi ...

Same kiel la efikado de tiuj fortokombinaĵoj, kiujn la homo rigardas kiel „naturleĝojn“, *tute ne estas io neŝanĝebla*, tiel same la *direkto*, en kiu la unuopaj ĉeneroj de kaŭza okazado viciĝas, ankoraŭ povas esti *relative* difinata de la *spirita* volo, sed la *potenco* de la spirita, Dia volo konsistas *nur* en tiu *tute relativa* difinebleco de kaŭza okazado, *ne povante* transpasi la limojn, kiujn la sama volo trovas *en si mem*: starigitajn *de ĝi mem* de eterne ĝis eterne ...

Parolante en pia simpleco, oni povus diri: – Dio vere kapablas influi la surteran okazadon *ĝis certa grado*, sed tie ĉi lia volo ĉiam restas *difinita per la imanenta, propra leĝo*, tiel ke *ĉiu* influo povas esti farata *nur* per la *uzado* de la *efikomaniero de teraj fenomenfunkcioj*, kiu maniero estas difinita de la sama volo.

La homo povas esti ĉiutempe *certa*, ke *Dio* preventos sur tiu ĉi tero *ĉiun* malfeliĉon, kiun Li *povas* preventi. Do ĉia kverelado kun Dio pro tio, ke Li *ne* preventis iun malfeliĉon, povas devenigi sian ŝajnan rajtigitecon nur el la malsaĝa supozo pri *materia* Dia „ĉiopoveco“ – en la senco de *ĉiama ŝanĝebleco* de la okazado – kaj tial estas *blasfemo* pro „*nescio*“. –

Sed kio plue necesas scii, estas la *nekontestebla fakto*, ke ĉiu *eblo de Dio* *deviigi la direkton* de tera

kaŭza okazado necesigas la *homan spiriton*, – alivorte: *ĉia* influo de *Dio* sur la teran ekziston bezonas la *homon* kaj ties *pretecon* liberigi la vojon por tiu eblo, ĉu per konscia *direktado* de la homa *volo* aŭ per pasiva memdonado en *preĝo*. – –

„*La fervora sopiro de la kreitaro atendas la malkaŝon de la filoj de Dio.*“

Sed eĉ *sciante* tion, la homo ne atendu *neeblaĵon* kaj ĉiam rememoru, ke la *vera* „ĉiopoveco“ de Dio estas de eterne *difinita* per la volo al memmanifestiĝo, sed ne povas agi *kontraŭ* tiu memdefiniteco, ĉar se tiu kontraŭagado estus *ebla*, ĝi signifus *memneniigon*. –

Sume, „ĉiopoveco“ *vere* estas en la Dia eterna *esto*, ĉar *ĉio* „ekzistanta“ atestas la *potencon* de tiu absoluta *esto*, sed *ne* en la konfuza, stranga senco, ke tio Dia iam povus difini la – per la *propra esto* difinitan –, *ekziston*“ de tio metita *el* ĝi kaj *kontraŭ* ĝi *aliamaniere*, ol ĝi estas difinita el ĝi de eterne, sekve de imanenta *neceseco*.

Ĝis en griza pratempo etendiĝas la homa penado teni la mensojn hipnote katenitaj en la erara imagaĵo de *neebla* „Dia ĉiopoveco“...

Vere: estas tempo, ke tiu kateniĝo estu *finata*, por ke la homo ne perdu ĉiun kredon je Dio! –

Ekkoni la limojn de la ĉiopoveco signifas: vere *kompreni* la kosmon kiel la malkaŝon de *la eterna potenco*.

La nova vivo

Granda estas en tiu ĉi tempo la aro de *serĉantoj*, kiuj strebas al la *lumo*.

Sed pli granda restas ĉiam la armeo de la homoj *sklavigitaj al la tero*, kiuj sentas en si *neniom* de tiu forta impulso al la lumo, kiu movas la serĉantojn.

Apenaŭ konscia pri sia propra malvasteco, la servutulo de sia terligita spertado kredas, ke ĉiuj homoj povas sperti nur *tion*, kion *li* kaj liaspeculoj *kapablas* sperti.

Se aliuloj serĉas la vojon al la *spirito*, homo ligita al la animalo rigardas ilin kiel grandajn malsaĝulojn.

Lia *pensado* estas por li lia „spirito“, kaj li ne plu komprenas la parolon de siaj fratoj, kiuj antaŭsentas *realon*, pri kiu lia pensado scias nenion.

Certe, li iam *elpensis* al si ĉielon kaj inferon, sed li povis ankaŭ *dissolvi* la elpensitaĵon per sia pensado, tiel ke li nun opinias sin rajtigita konkludi el sia propra sperto, ke ankaŭ la alta celo de la serĉantoj estas nur *elpensita*, ombreca „realo“ kaj estas same *detruebla* per pensado, kiel la elpensitaj regnoj de sia propra imagita mondo. –

Sekve la alteco kaj vasteco de la homa eblo de spertado restas nekonataj al tro multaj homoj, ĉar ili opinias esti jam *trovintaj* la „spiriton“ en la malvasta ĉirkaŭaĵo de sia pensado, esti *sekurigitaj* en sia pensado, kaj ne sentas en si iun impulson serĉi la esencan spiriton *tie*, kie sole ĝi estas *trovebla*: en neelpensebla *spertado*. – –

Ke tiu „spertado“ povas okazi nur en la propra *interno*, estas forgesata ankaŭ de kelkaj *serĉantoj*, kiuj jam antaŭ longe ekkonis, ke la esenca *spirito ne* estas atingebla en pensado.

Tiamaniere, multaj el la serĉantoj strebas nur al eksterordinara spertado en la *ekstera mondo*, kaj ne fariĝas klare al ili, ke eĉ la plej mirakleca ekstera travivaĵo neniam povas doni tiun internan *iluminigon*, kiu heligas la tutan mallumon de ekkonado, ĉar la ekkonanto estas *unuigata* al la lumo de la spirito mem. –

Ankaŭ *interna* spertado havas daŭrontan valoron nur tial, ke ĝi estas antaŭsigno de tiu *unuiĝo kun la spirito*. –

Sed la *plej alta celo* estas interna spertado, kiu ne plu estas direktata al unuopaj spertoj.

Kio tie ĉi estas spertata, estas: – *nova esto*.

Nur el tiu nova *esto* estas *ŝanĝata ĉiu* spertado, – ĉu en la propra *interno* aŭ en la *ekstera mondo*.

Al la serĉanto tiam doniĝis *nova vivo*.

Vivo tiom plena de *enhavo*, ke ĉiu avideco je *mirakloj*, kiu eble antaŭe ensorĉis la *deziradon*, malaperas por ĉiam.

Ĉar kion la „miraklo“ en la *ekstera mondo*, kiun serĉis la blinda amaso de ĉiuj tempoj, povus ankoraŭ signifi al *tiu*, kiu ekde nun spertas *en si* la nekompreneble plej altan miraklon? –

Li scias, ke ĉiuj „mirakloj“ en tiu ĉi ekstera mondo, kiujn la plej sovaĝa fantazio povus imagi al si – se ili iam povus reale okazi –, ja restus enŝlositaj en la *fizika* okazado de tiu ĉi mondo: – sen valoro kaj sen efiko, tuj kiam oni forlasas la teran, animalan korpon...

Certe, li konatiĝas kun *magio*, kiu ankaŭ en la surtera vivo povas efektiviĝi – per la uzado de altaj fortoj – aferojn, kiuj neniam estas efektivigeblaj per iuj teraj artoj. Tamen li ne lasas trompi sin per tia efikado, – kiu estas nur *vualita* al tera ekkonado –, ĉar en la lumo de la spirito li ekkonas, ke ĉio ĉi plivastigas nur *surteran okazadon* kaj neniom atestas la esencan *spiriton*, kiu, estante alte super ĉio ĉi, sin montras nur en *homa spirito* por la spirito de tiu homo mem, ĝia eterna generaĵo. – –

Tiel, – estante helpanto de tiuj, kiujn la spirito preparis al si en homa spirito kiel sian manifestiĝon en homa figuro, – li penos doni *lumon* al ĉiuj, kiuj tie ĉi lumon *sopiras*.

Estante for de ĉia avideco je mirakloj, li povos klaraokule ekkoni la *verajn* miraklojn de ĉiutaga okazado, kaj per la lumo, kiu lumigas lin mem, li heligos ĉion malluman ĉirkaŭ si.

Li konas *la novan vivon*, kiun la homoj sklavigitaj al la tero *moke insultas*, sed *ne povas atingi* tiom longe, dum ili restas ligitaj al la nokto de l' terhoma animalo ...

*

Al kiu *sufiĉas* la tomba nokto feble heligita de malfortaj lumiloj, en kiu li troviĝas, kaptita en la animaleco de tiu ĉi tero, tiun eĉ la „lumantoj de la pralumo“ ne povas liberigi. –

Nur tiu, kiu volas liberigi *sin mem*, tie ĉi povas trovi liberigon. –

Sed li estu bone konscia pri tio, ke „mirakloj“ en la tera okazado estas nek necesaj nek „utilaj“, se li serioze volas atingi la *lumon*. – –

La spirito ĉiam elektos la *plej simplan* manieron, kiam ĝi volas malkaŝi sin al homa spirito per unuiĝo.

Mi havas plej gravajn dubojn, kiam iu diras al mi, ke li sentas sin vokita de la spirito, sed samtempe raportas al mi pri tre „miraklaj“ okazaĵoj, per kiuj li celas pruvi la rajton pri tiu vokiteco. –

Ĉiam estas entenata granda mezuro da vanteco kaj aroganteco en la postulo, ke la spirito atentigu pri si mem en aparta maniero en la ekstera mondo: – per ebloj de spertado, kiuj ne estas prezentataj al ĉiu homo. –

Kiu vere *havu* tiajn spertojn, tiun ili trafas *nesupozite* kaj subite, sen tio, ke li iam estus serĉinta aŭ eĉ atendinta tiun spertadon.

Tiam la spertado estas *spirite* signifoplena kaj grava por la plua vojo. – –

Sed kiu *serĉas* „miraklon“, al tiu nur la „infero“ montras siajn artojn, kaj ĉiu, kiu ekiras por trovi *magiiston*, povas esti certa, ke ĉarlatano lin trompos.

Se vi volas atingi la *novan vivon*, – la vivon en la *spirito*, la vivon, kiu ne konas la *morton*, – tiam bridu vian avidecon je tio mirakleca, kaj sciu, ke la *vera* Dia miraklo renkontos vin nur en la propra *interno!* –

Per *tiu* spertado oni ne povas fanfaroni antaŭ aliuloj; sed mi esperas, ke vi ne volas sakrilegii tion, kion la spirito donas al vi, taksante ĝin nur laŭ tio, kiel ĝi povus servi al vi por montri vin antaŭ aliuloj kiel aparte „grace favoritan“ homon. – –

Estas preskaŭ nekredeble, sed bedaŭrinde mi parolas surbaze de sperto, se mi sciigas, ke mi renkontis homojn, kiuj tute serioze opiniis, ke ilia strebado al unueco kun la praeterna spirito certe konformas al spirita leĝo, kaj tamen ne lasis preterpasi iun okazon por fanfaroni antaŭ ne juĝkapablaj homoj pri sia „mistera“ spertado ...

Tia homo per tio montras, ke li deflankiĝis nedireble foren de la vojo al la spirito.

Ekkonu lian senmezuran avidecon montri sin mem, la mizeran malgrandan teran animalon, antaŭ vi en eksterordinara lumigo, kaj ne lasu vin peli de li en timon kaj zorgon, ĉar vi, kiu serioze sopiras nur la *unuecon kun la eterna spirito*, ne havis la samajn strangajn travivaĵojn!

Iru do trankvile la vojon al vi antaŭdesegnitan en la ekstera mondo, kaj ne kedu, ke estas necese apartigi vin de la tuta mondo, por atingi *en vi la spiriton!*

Tio, kion vi spertas en via interno, estas donita al vi nur por *vi mem*.

Sed tio, kion vi povas doni al aliuloj, portas sian valoron *en si*, eĉ se ĝi ne estas konfirmata per unu sola vorto pri propra spertado.

Parolu pri tiu spertado *nur tie*, kie vi povas esti certa, ke estas nepre *necese* paroli pri ĝi!

Sed al ĉiuj *aliaj* homoj *via tuta farado kaj konduto* povas esti *senparola instruo*, kiu ofte efikas *pli bone*, ol se vi volus ĉie per laŭtaj vortoj diskonigi tion, kio vin movas.

Vi ankoraŭ devas okupiĝi tro multe pri vi mem, ol ke vi jam povus senti vin destinita por instrui aliulojn, kiuj ne postulas tion de vi. —

Kun vi sola vi devas migri sur la vojo al la spirito, se vi volas atingi vian celon. —

Nur kun *vi sola* vi povas trovi vian *novan vivon*.

Starante kun *vi sola* en via nova vivo, vi iam povos alporti helpon ankaŭ al tiuj, kiuj kiel vi arde *sopiras la novan vivon*. — — —

Festa ĝojo

Tie ĉi ne estu parolate pri brile pompaj *eksteraj* festoj, kaj ne pri la ĝojo de tiuj, kiuj ne konas *aliajn* festojn.

Mi volas paroli pri festa ĝojo, kiu prosperas nur en *soleco* kaj ne toleras atestantojn krom la spertanto...

Mi vidas vin troe serĉi *eksterajn* festojn, kaj mi timas, ke vi jam mallernis prepari, kun vi mem, festojn al via animo. –

En ĉiu tempo, saĝaj regantoj sciis, ke la homoj lasas sin konduki plej bone, kiam oni provas dolĉigi al ili la ĉiutagan penadon per gajaj festoj. Tiel same ankaŭ vi sciu pri vi mem, ke vi plej baldaŭ fariĝos mastro de ĉio en vi, kio obeu vin, kiam vi scias ne nur *servigi tion rezistantan*, sed ankaŭ prepari al *tio volonte servanta* altan *feston*, ĉiufoje, kiam ĝi montriĝas laca.

Tiu festa ĝojo de la *animo* vere estas *pli* necesa, ol iuj el la plej bonaj suspektas.

„Ne per la pano sole vivas homo, sed per ĉio, kio eliras el la buŝo de la Eternulo, homo povas vivi.“

Sed la nutranta Dia vorto eniras en vin nur, kiam vi feste preparis vian animon por ricevi ĝin. –

Dum vi estas laborejo de la ĉiutaga vivo, – kaj tio vi *estu* en la ĉiutaga vivo, – vi devos kontentiĝi per la anima nutraĵo, kiun alportas al vi la *vivo ĉiutaga*, kaj dum la tempo de via laborado en la ekstera mondo tia nutraĵo sufiĉos al vi.

Sed de tempo al tempo via animo montriĝos *laciĝinta*, kion vi ekkonas je tio, ke ĝi *ne plu kapablas enpreni* la manĝon, kiun la ĉiutaga vivo prezentas al ĝi.

Ĝi tiam sopiras *alian* nutraĵon, kiun neniam povas prezenti al ĝi la vivo ĉiutaga, kiom ajn riĉa je anima nutraĵo tiu vivo eble estas.

En tiuj horoj vi devas scii, ke nun estas la tempo por prepari *feston* al la animo.

Sed vi ne povos fari feston, dum vi restas „laborejo de la ĉiutaga vivo“, el kiu la polvo kaj malpuraĵo de la ĉiutaga laboro neniam povas esti plene forigataj.

Tial sciu pri via magia forto ŝanĝi vin mem!

Certe, estas via *devo*, servi al la ĉiutaga vivo kiel laborejo, sed vi ankaŭ havas *horojn*, en kiuj vi estas *libera* elekti *tiun* formon, kiun sopiras la plej profunda profundo de via animo.

En tiuj festohoroj vi povas *fari vin mem alta katedralo* kaj celebri en *vi mem la misterojn...*

Vi mem povas plenigi vin per sono de sonoriloj kaj tonoj de orgeno.

Vi mem tie ĉi estos la kantanto de sankte altaj psalmoj.

Se vi scias interpreti la bildojn, kiuj tie ĉi volas paroli, tiam vi jam de longe scias pri la *speco* de „festa ĝojo“, kiun via animo bezonas, se ĝi ne malfortiĝu iom post iom en la ĉiutaga ekzisto.

Vi sufiĉe bone konas la horojn, en kiuj via animo laciĝas kaj rifuzas ĉion, kio aliatempe servis al ĝi kiel nutraĵo.

Mi konsilas al vi: *ne turmentu vin* en tiaj horoj, sed baldaŭ preparu *feston* al via animo!

Enŝlosu vin en vian ĉambron, aŭ iru en la naturon por tie serĉi lokon, en kiu neniu povas ĝeni vin.

Tie aŭ tie ĉi, kie ajn vi povas esti *sola kun vi*, estas la ĝusta loko, kaj eĉ meze de aliaj homoj, kondiĉe ke vi povas esti certa, ke ili ne igos vin paroli.

Estante tiam sola kun vi, ignoru en vi ĉion, kio ankoraŭ volas memorigi vin pri la ĉiutagaj bataloj kaj penegoj.

Poste vi trovos sufiĉan tempon por ordigi kaj ort-angule aranĝi ĉion, kio eble nun volas malkvietigi vin.

Malplenigu vin je ĉio, kio ŝajnas al vi esti ne *festa*, ne *festĝojiga*!

Sed tiam formu en via pensado la plej puran, plej grandan kaj plej belan homan bildon, kiun via imago-povo kapablas formi.

Lasu tiun bildon fariĝi viva en vi, kaj kiam ĝi staras palpeble antaŭ via animo, tiam – *identigu* vin kun ĝi, kaj forigu el via menso ĉiun penson, kiu volas montri al vi, kiom multe vi diferencas – kaj ne je via avantaĝo – de tiu ideala bildo! –

Certe, en via ĉiutaga vivo vi ankoraŭ ne egalas tiun bildon, kiun vi mem formis kaj kiu tial prezentas *eblaĵon*, kaj neniu scias, ĉu vi povas esti sufiĉe fidela al vi mem por iam plene egaligi vin al ĝi.

Sed: – dum tiu ĉi via festa horo vi celu *forgesit*ion, kio ankoraŭ estas *manko* je vi!

Dum tiu ĉi via festa horo vi vidu vin nur en la alta hombildo de vi formita, kaj vi forpelu de vi ĉion, kio ne konformas al ĝi!

Nun, dum tiu memtenado, estigu en vi solene sanktan etoson plenan de interna festa ĝojo kaj danko, tute ne konsiderante vian kutimon unue *pruvi* al vi per via pensado, ke vi estas *rajtigita* fari tion.

Ne zorgu, kaj kredu al mi, ke post via reveno en la ĉiutagan vivon prezentiĝos al vi pli ol unu horo, en kiu vi povas fari la memkritikon, kiun viaopinie vi eble neglektis. –

Estas senlime grave por via animo, ke ĝi *konas* ĉiujn viajn homajn malfortojn kaj mankojn, sed estas ankoraŭ pli grave, ke vi sufiĉe ofte donas al ĝi la eblon vidi vin *tia*, kia vi povas *fariĝi*, kiam vi estos fariĝinta *mastro* en vi mem. –

En horoj de memkritikado vi ne povas vidi vin sufiĉe akre kaj ne trakti vin sufiĉe senindulge.

Sed ne estu malsaĝa, opiniante, ke vi iam povus fariĝi „pli bona“ per tio, ke vi konstante enprofundiĝas en la *bildon de manko*, kiun via memkritiko montris al vi!

„Pli bona“ fariĝas nur la *kreanto*, kiu, *ekkoninte* siajn mankojn, kreas el si mem sian *idealan bildon* kaj tiam penas pli kaj pli *alkonformigi* sin al *tiu* bildo.

La festohoroj de via animo celas *malstreĉi*, *mal-kompaktigi* viajn sentadon kaj pensadon, tiel ke ĉio en vi estu preparata por *konformi* al la ideala bildo formita de vi.

Tial mi instruas vin krei al vi tiun festoĝojon ĉiufoje kiam via animo sentas sin lacigita en la ĉiutaga vivo.

El ĉiu tia festohoro vi eliros kun pli granda kvanto da anima forto, kvanto kiu eble mirigos vin ...

Vi lernos pli kaj pli majstri la ĉiutagan vivon, kaj via festa ĝojo heligos al vi eĉ la plej mallumajn horojn.

Sed fine vi *tiumaniere* spertos jam dum la surtera vivo *tiun* festan ĝojon, kiu *ne* plu povas esti interrompata, ĉar ĝi estas atesto de: la *eterneco*. – –

Tiun *daŭran* festan ĝojon vi atingos des *pli baldaŭ*, ju *pli ofte* vi preparas al via animo la festohorojn, pri kiuj mi tie ĉi parolas. –

Kiel *neperfekta* estu rigardata de vi ĉiu tago, en kiu vi ne sukcesis enmeti tian festan horon!

Ne kredu, ke la ŝarĝo de via ĉiutaga laboro tion ne permesas!

Eĉ kiam vi estas ŝarĝata per laboro kiel galerulo, vi povas ĉiutage akiri vian festohoron, se vi tion vere *volas*, kaj ne necesas, ke ĝi estu „horo“ *laŭ la horloĝo*.

Plenigite per neatendita *forto*, vi tiam povas *denove* komenci vian *laboron* en la *ĉiutaga vivo*. –

Valoro de la rido

Se vi ankoraŭ neniam povis liberigi vin el mal-lumaj kaj turmentaj horoj per via *rido*, vi ankoraŭ vere ne scias, kiom valora la rido povas esti.

Vi eble eĉ malestimas ĉiujn, kiuj saltas trans ĉiun foson per sia levanta *povo ridi*.

Vi ne povas kompreni, ke ekzistas homoj, kiuj kapablas ekregi eĉ la plej ronĝantan *doloron* per sia rido.

Ŝajnas al vi supraĵaj kaj malriĉaj je sentemo ĉiuj, kiuj ankoraŭ povas ridi, kiam griza tristeco ĉirkaŭas ilin.

Atentu, mia amiko, ke vi ne eldiru juĝon pri vi mem per tio, ke vi ekscitiĝas kontraŭ la povo ridi de aliuloj!

La proverbo diras, ke oni ekkonas *malsaĝulon* per lia rido, sed rido ne malpli certe montros al vi *saĝulon*.

Per via rido vi kapablas liberigi el granda embaraso ne nur vin mem, sed ankaŭ ĉiun alian en via ĉirkaŭaĵo.

Kiom ofte elkora, infekta rido preventis grandan malbonon! — —

Kolero kaj ekscito tuj fariĝas mokindaĵoj, kiam tia rido ĝustatempe tiras la regadon al si.

Kaj tamen ekzistas homoj, kiuj ŝajnas preskaŭ *timi* la ridon, – kiuj vere penas resti grumblemaj kaj strange seriozaj, kiam ili vidas aliajn ridi.

Iuj el ili kredas perdi iomon de sia digno, se oni vidus ilin ridi kun gajuloj, – la *aliaj* tenas sin en strikta disciplino, ĉar ili volas venki la teran malsaĝon kaj opinias ĉian *gajecon malsaĝa*.

Tiel *ili mem* fariĝas malsaĝuloj, opiniante, ke ili estas saĝaj.

Vidu, ho serĉanto, kiu strebas al *harmonio* en via animo kaj volas unuigi vin al la *spirito* en vi mem: – mi ne povos „*preni vin serioze*“, antaŭ ol mi scias, ke vi povas *ridi!*

Vi certe ne fariĝu malsaĝulo per via ridado, sed vi ankaŭ ne evitu la okazon ridi.

Eĉ plie:

Via strebado al la spirito estas al mi suspektinda tiom longe, dum vi ankoraŭ kredas, ke vi laŭeble devu malkutimi la ridon. – –

Mi volas vidi vin kiel homon, kiu neniam devas perdi sian povon ridi.

Vi ankoraŭ povu ridi, kiam aliaj jam antaŭ longe estus perdintaj ĉiun kuraĝon.

El via rido mi volas aŭdi, ke vi estas *certa atingi* la celon de vi alstrebatan.

Via rido devas montri al mi, ke vi sentas vin sekura kaj venkis ĉiun timon. –

Fatala eraro eĉ hodiaŭ igas tro multajn homojn kredi, ke ili ne povas proksimiĝi al Dio kaj al tio Dia, se ili ne lamentante ploras pri sia „pekokulpo“.

Sed vi lernu *mokridi* vian pekon, ĉar nur se vi ekkonas, ke via peko estis rezulto de via *malsaĝo*, vi estonte povas *eviti* ĝin!

Vi fariĝu la objekto de *memmokado*, kiam vi rememoras la mallumajn tagojn, kiam vi ankoraŭ *povis* peki, kaj opiniis trovi „feliĉon“ en pekado! – –

Vere, neniu pento tiros vin el pekado tiom forte, kiom via libera rido pri via malsaĝa farado. –

Kaj eĉ se vi malleviĝis en pekado ĝis super via verto, vi nun tiom pli moku vian iaman malsaĝecon kaj lernu ridi pri vi mem! – –

Per via tuta lamentado vi povos fari neokazinta nenion, kio iam okazis.

Eble via pento kvazaŭ dornbarilo ĉirkaŭlimigos al vi la regnon de peko, – sed ĝi restos por vi nur „malpermesita lando“, kaj se vi estas sincera kontraŭ vi mem, vi tamen trovos en vi profunde kaŝitan *bedaŭ-*

ron, ke tiu ĉirkaŭbarita lando estu nun la limo de via libereco ...

Nur se vi lernas *mokridi* vian avidecon je peko, vi vere povos *forsavi* vin de ĝi.

Nur tiumaniere vi fariĝos vere *libera* de la inklino al peko.

Kio ajn troviĝas malantaŭ vi sur la vojo de via vivo: – ĝi ne devas esti al vi kaŭzo por eviti la gajecon.

Se antaŭe gajeco signifis por vi *pekon*, vi nun lernu ekkoni, ke pura gaja sereneco estas eterne *neakordigebla* kun la malsaĝo, kiun oni nomas „peko“.

Vi subfalis nur al vanta ŝajno, se vi por mallonga tempo povis lasi vin al la iluzio, ke daŭra ĝojo estas trovebla en la peko. –

Via *rido* pro via propra blindiĝo gardos vin, ke vi ne denove fidu tiun ŝajnon.

Ju pli vi lernas *ridi*, des *pli libera* vi fariĝos.

Ju *pli libere* vi povas ridi, des pli serioze vi iros renkonte al la aferoj, kiuj senvualiĝas nur al serioza strebado. –

Tiel via povo ridi fariĝos al vi granda helpo sur via vojo, kiu kondukas al vi mem.

Tiel vi povos ridante montri vian frunton al ĉiu danĝero.

Tiel via rido *liberigos* vin de ĉiu tera pezo, kiu
celas tiri vin malsupren. – –

Venki sin mem

Libere kaj „plene vivi“ sian personecon estas far-iĝinta kvazaŭ postulato de la moderna homo.

Ĉiu kredas havi la *rajton* por tiu „plena vivado“; mi renkontis eĉ homojn, kiuj sentis sin *devoligitaj* al ĝi.

Tiun opinion akre kontraŭas la postulo, kiu estis ĉiutempe farata de tiuj, kiuj volis liberigi siajn kun-homojn el tera ligiteco, por konduki ilin al la feliĉo de la propra spertado en la spirita mondo.

Temas pri la postulo, ke la strebanto *antaŭ ĉio* lernu *venki* sin mem, kaj la paradokse sonanta admono estas: „*Nur tiu povas veni al si mem, kiu sin mem venkis.*“ –

Ŝajne ne ekzistas ponto kondukanta trans la fendegon inter tiuj kontraŭoj, sed tamen *bezono* kaj *ekkono* estas tie ĉi por ĉiam *apartigataj* nur, se la *interpreto* de tiuj vortoj apartigas la du aferojn...

Tiom longe, dum la bezono „*plene vivi*“ restas limigita al *pure fizika* spertado, ĝi vere *ne* estas akordigebla kun la *spirite* postulata devo „*venki sin mem*“.

Sed same la postulo „venki sin mem“ restas *neplenumebla* tiom longe, dum ekzistas la erara interpreto, kvazaŭ tie ĉi temas pri la „*mortigado*“ de *si mem*: – pri la *neado* de sia *mempertado*.

Finfine la postulo, ke oni venku sin mem, estas nenio alia ol frukto de ekkono, kiun plukis ĉiuj, al kiuj *ne sufiĉis* sperti sin nur en la tera, *fizika* regiono: – kiuj volis „plene vivi“ *ankaŭ tie*, kie ili neklare antaŭsentis *la plej internan fundon de sia propra esto*.

La bezono „*plene vivi*“ tute ne estas *neata*.

Male, tiu bezono estas *plenumata* en eĉ *pli alta* grado, kaj tiel oni ekkonas, ke *perfekta* „plena vivado de si mem“ estas atingebla nur, post kiam oni *venkis* tion, kio *malhelpas* tiun plej altan „plenan vivadon“.

Sed kiu opinias, ke ĉia eblo de memspertado kuŝas nur en la *fizika* ekzisto, tiu laŭ sia eraro agas konsekvence, se li limigas sin al tio, ke li volas „plene vivi“ sian vivon sole en la *fizika* regiono, ne sciante, ke lia bezono de riĉa memspertado celas *foren trans* la regionojn de tera spertado. – –

Por kompreni ĉi tiun bezonon kaj povi direkti ĝin sur ĝian plej altan vojon, devas esti fariĝinte klara al oni, kio konsistigas la *tutan* realon de la homo.

Oni ne devas kontentigi sin per tio, ke oni rigardas nur tion *fizike* percepteblan.

Se vidate nur kiel produkto de la *tero*, la homo vere ne estas io alia ol stranga *animalo*, kun ĉiuj ecoj de animalo.

Mi eĉ hezitas nomi lin „pli alta“ animalo...

Tie ĉi temas tute ne nur pri la *korpo*, sed ankaŭ pri la *psiko* de la animalo.

Sed tiu animalo, – kontraŭe al aliaj animaloj, – fariĝis la *manifestiĝa objekto* de *spirita* estaĵo, tiel ke, per ties influo, la *psiko* de tiu animalo estis *plivastigata* kaj *altigata* dum la paso de jarmiloj.

Malgraŭ tio, la *animala* naturo konserviĝis, kaj eĉ se ĝi daŭrus eterne en sia individua formo, ĝi neniam povus esti „*spiritigata*“, t.e.: *transformata en ion spiritan*.

Tute same, la *spirita* estaĵo, kiu volas manifestiĝi en tiu animala formo, eterne ne povas *animaliĝi*.

Sed tiu *spirita estaĵo* estas ligita al *organismo*, – organismo de *plej subtila, nevidebla* speco, – kiu povas esti nomata, kvankam ne „ekster-“ aŭ „superkosma“, tamen vere „supertera“, ĉar ĝi konsistas el substanco, kiu ja *trapenstras* la teron, sed tute ne apartenas al la esencaj substancoj de la planedo „tero“.

Tie ĉi temas pri la *kosma-spirita* „homo“ en sia *plej terproksima* formo, *per kies influo* la tera animalo, en kiu li manifestiĝas, fariĝas la tera *homo*.

Certe, la kosma spirita homo de plej terproksima formo estas plej intime *ligita* kun sia manifestiĝa objekto: la terhoma animalo, dum la vivodaŭro de tiu animalo sur la tero, – sed tiu ligiteco povas esti la kaŭzo de *ĝojo* same kiel de plej terura *infera turmento*, ĉar lia dezirego manifestiĝi povas esti *helpata*, sed ankaŭ *malhelpata* kaj eĉ *tute eliminata* fare de la tera animalo.

Normale la tera homo havas nur la konscion de la *animaleco* pli aŭ malpli altigita per la influo de la spirita homo.

Tio aplikiĝas al eruditoj kaj neeruditoj, al junuloj kaj maljunuloj, al potenculoj kiel al almozuloj.

Sed estas eble, *trarompi* la normon, tiel ke la tera homo tiam havas ne nur la konscion de la *animaleco*, – kiom ajn vaste ĝi eble estas diferencigita, – sed *samtempe* troviĝas en la lumoplena konscio de la *spirita homo*.

Tio estas atingebla nur post plenumado de tiu kondiĉo, kiun la iluminiĝintoj de ĉiuj tempoj nomas „*memvenkado*“.

Tiu ĉi vorto ne devas esti *misinterpretata*, kaj homo sopiranta eliĝi el la animala konscio ne devas opinii, ke oni postulas de li, ke li ekde nun *rezignu*

sian animalecon, – kiun la spirita homo ja *bezonas* por sia manifestiĝo sur la tero. – –

„*Mortigado*“ de tio animala estas *krimo*, – indifere, ĉu tiu „mortigado“ celas nur la *paralizon* de la animala naturo, aŭ kondukas al la *memneniigo* de la animalo. –

La *asketo*, kiu *turmentas* tion sian animalan pro tio, ke ĝi ne obeas lin, tute ne devas rigardi sin supera al la *memmortiganto*, kiu per unu fojo *detruas* sian animalecon, – ĉar li agas nur *malpli konsekvence*, sed tute ne *malpli kondamninde*. – – –

Postulata estas nur la *venkado de ĉiuj streboj de la animalo*, pri kiuj oni sentas, ke ili malhelpas la *manifestiĝon de la spirita homo*.

Postulate estas, ke la animala konscio ekkonu sin mem kiel tian kaj strebu alten super sin mem.

Nur tio estas ĝusta „*memvenkado*“. – – –

Kio el tio povas rezulti, estas la *unuiĝo de la animala konscio kun la konscio de la spirita homo en homogenan unuaĵon por ĉiam kaj eterne*. – –

Tiam la morto vere estos „*perdinta sian pikilon*“, ĉar *kun la konscio de sia identeco* la tiel unuiĝinta homo iras el tiu ĉi surtera vivo en la mondon de la *substanca pura spirito*.

La animala homo kreis *al si mem* la eblon liberigi sin, sed samtempe la *spirita homo* estis malligata

disde li: – liberigata el la suferiga malhelpo fare de la animalo, kiu nun volonte servas lin surtere kaj per sia animo restas unuigita kun li en nedisigebla unuiĝo. –

Sed se tiu ĉi unuiĝo *ne* okazas tie ĉi surtere, tiam povas pasi eonoj, antaŭ ol la „animo“, kiu transvivas la homan animalon, iam kapabliĝas kunfandiĝi kun la spirita homo, kiu donas al ĝi eternan propran vivon, en unuiĝinta konscio...

En ĉiuj tempoj ekzistis homoj sur tiu ĉi tero, kiuj jam dum sia surtera vivo unuigis en si la „animalon“ kun la „Dio“: la homanimalan konscion kun la konscio de la spirita homo, kaj ĉiu spirita scio ankoraŭ hodiaŭ trovebla surtere – kiom ajn miksitaj kun aldonaĵoj de nevokitoj – iam originis el tiaj homoj, ĉar *neniam la Dieco parolis al la tera homaro aliamaniere ol per homo.* –

Sed ĉio, kion havis por diri tiuj, kiuj povis instrui el sia *homspiriteco*, ĉar ili estis *konsciiĝintaj en ĝi*, ĉiam helpis nur tiujn homojn, kiuj lasis sin movi al tio, ke ili *kun sia tuta volo strebis al la praktikado de la „memvenkado“ en la senco tie ĉi indikita.*

Neniu homo povas *savi* alian homon, – sed kiu *konas* la vojon al savo, tiu povas *montri* ĝin al aliaj.

Igi ilin iri tiun vojon, li havas nek la povon nek la rajton.

Kaj vere: – estas *malfacile* por la tera homo konfesi al si, ke li ankoraŭ vivas sole en la *animala konscio*.

Tio estas *malfacila* precipe por tromemcertaj homoj, kiuj kredas esti trovinta sian savon en iu ajn religia sistemo, – tio estas *malfacila* por tiuj, kiuj opinias sin „riĉaj“ en spirito pro tio, ke ilia sagaceco povas ĉion *pense dispecigi*.

Mi povus tre bone kompreni tiujn memkatenitojn, se ili insultus min pri miaj vortoj, anstataŭ kuraĝe *provi* ilin por eltrovi, ĉu ili estas veraj ...

Firme frostiĝintaj, kiel radspuroj sur malbonaj vojoj en vintro, estas la pensotrakoj en multaj cerboj.

Sed laŭ eterna leĝo neniu povos plu ŝanĝi sian sorton, post kiam li devis forlasi la teron...

Nun, en la momento, en kiu vi legas tiujn ĉi vortojn, estas veninta por vi la tempo por esplore konsciiĝi pri vi mem.

Nun vi ankoraŭ *povas* decidi kaj estas mastro de viaj decidoj.

Sed restas senvalora por vi la konsiderado de miaj vortoj, dum vi ne volas per via tuta forto *agi* laŭ ili.

Vi agos *prudente*, se vi ne atentis vian *antaŭjuĝon*, ĉar vi estos *kapabla* juĝi nur tiam, kiam via *venko super vi mem* liberigis vin el la tiranemo de via

animaleco kaj vi eniris en la konscion de via *spirita homo*. — —

Vi devas venki ne min kaj miajn vortojn, sed *vian eraron*, kies kaŭzo estas *en vi mem*.

Perfekiĝo

Ĉiom da plej alta saĝo kuŝas en la *esto*
kaj *ne* en la „pensado“. – –

Nur plej profunda *realo* en vera *esto*
povas donaci al vi
lumante veran *pensadon*.

Pensado estanta *nur* „pensado“
kondukas sur eraran padon –
Sole vera *esto* naskas pensojn
plenajn de graco.

Ĉiu plej alta saĝo fontas
el plena *vivo* – –

Nura *pensado* neniam donos al vi
plej altan *saĝon*.

Tradukoj de pliaj libroj
el la instrua verkaro de Bô Yin Râ
estas elŝuteblaj ĉe jena retejo:
<http://boyin-ra.org/esperanto/>